


Pero Simić

**Tito – sekreto de la jarcento**

Beograd 2009 / Ljubljana Orbis 2011




# Kiel Tito fariĝis komunisma krimulo

### Kritikaj kontribuaĵoj al la biografio de Josip Broz Tito

La hagiografia Tito-biografiko – kaj praktike ekzistas nur tia – dum jardekoj sukcesis kun granda efiko peradi ege pozitivan, heroisman kaj rozkoloran bildon pri la karisma gvidanto de Jugoslavio, Josip Broz, nomata Tito (1892-1980). Tito kaj lia movado impresis kaj influis tutajn generaciojn de jugoslavoj kaj alilandanoj, kaj lia glamoro brilas fakte ĝis hodiaŭ praktike sen esenca ŝanĝiĝo de la opinio ĉe la homoj. Kritiko pri liaj persono, regado kaj politiko estis evitata kaj subpremata, kontraŭbatalata kaj severe punata ne nur de Tito mem; precipe liaj multnombraj adeptoj kaj admirantoj kolere reagis kontraŭ la provoj makuli la bildon de Tito kaj rifuzis eksterajn riproĉojn al la adreso de sia adorata duondio. La „oraj jaroj“, kiujn Tito enkondukis laŭ ilia opinio en Jugoslavion, estas memorataj kun dankemo kaj nostalgio. Tia supraĵa perceptado kaj senkritika taksado de la persono, verko kaj politiko de Tito nature malfaciligis la objektivan traktadon de la temo. Male, la problemaj partoj de la historio de Jugoslavio kaj de la biografio de Tito mem estis plej ofte malatentataj, simple ignorataj kaj sisteme prisilentataj de la – komunismaj kaj alitendencaj – Tito-apologetoj.

Kiel unua elstara jugoslavia kritikisto de Tito elpaŝis *Milovan Đilas* (1911-95), kiu disvastigis siajn kritikajn konsiderojn pri Tito kaj la komunismo unue en sia furora ĉefverko *La nova klaso* (1957) kaj poste en sia malpli konata Tito-biografio (1980). Tito terure ofendiĝis kaj verŝajne sentis sin perfidita de sia malnova kunbatalanto, de kiu li radikale distanciĝis kaj venĝis sin per lia plurjara arestado en malliberejo, kiun tiu sentima disidento brave eltenis.

Post la morto de Tito (1980) lia iama oficiala biografo *Vladimir Dedijer* (1914-90)[1] publikigis siajn *Novajn Kontribuaĵojn al la Biografio de Josip Broz Tito*, en kiuj li prezentis interesajn detalojn kaj facetojn pri la vivo de Tito, kiuj en tiu formo ne estis konataj al la jugoslavoj, ĉar ili estis kaŝitaj de la historiografio, pro tio ke ili ne nur pozitive karakterizis la jugoslavian gvidanton. Certe, la *Kontribuaĵoj* de Dedijer fariĝis grava suplemento por la reviziado de la biografio de Tito kaj akcelis la erozion de la titoismo en Jugoslavio.

Kiel plej nova kontribuaĵo al la biografio de Tito estas konsiderenda ankaŭ la libro de *Pero Simić*, *Tito – sekreto de la jarcento.* Simić (naskita en 1946) estas aktiva serb-bosnia historiisto, kiu elektis la esploradon kaj kritikan komentadon de la blankaj makuloj kaj netuŝeblaj tabuoj en la Tito-biografiado kiel taskon de sia scienca laboro. La novajn konojn kaj sciojn pri la politika kaj privata vivo de Tito, kiujn Simić malkaŝis kadre de siaj esploroj en malfacile alireblaj arkivoj de Moskvo kaj Belgrado, li prezentis

[1] Dedijer verkis la ĉefan biografion, kiu estis aŭtorizita de Tito persone. Ĝi estis tradukita ankaŭ al Esperanto kaj aperis en 1954 ĉe Slovenia Esperanto-Ligo en Ljubljana.

en la nomita libro, kiu aperis en 2009 en Belgrado kaj kiu nun ekzistas ankaŭ en germana traduko.[2] Kun *Jože Pirjevec,*[3] alia elstara Tito-biografo, Simić estas nuntempe la plej konata kaj plej kompetenta ´titologo´ kaj fakulo pri la historio de la komunisma Jugoslavio. Kiel Simić mem emfazis en la antaŭparolo, la intereso pri lia libro estis tiel granda, ke la aŭtoro decidis daŭrigi siajn studojn por prezenti al la legantoj ankoraŭ pli da faktoj. Tiel, la germana eldono povis esti kompletigita per pli ol 600 novaj indikoj, kiuj ĝis nun ankoraŭ ne estis publikigitaj. Kvankam la libro de Simić ne fariĝis klasika biografio pri Tito, ĝi tamen estas valora dokumentujo pri la krimoj, kiuj estis plenumitaj en la nomo de Tito dum la stalinisma tempo kaj de lia partizana movado dum la dua mondmilito kaj post la transpreno de la povo fare de la komunistoj en Jugoslavio kaj ekster ĝia teritorio. Temas do pri nekredeblaj faktoj kaj informoj, kiuj laŭ onidiroj jam iel estis konataj, sed kiuj estis kaŝataj de la propagando kaj neniam povis esti prilaborataj historiografie aŭ publice, precipe kiam Tito ankoraŭ vivis. En sia ´nigra libro´ pri Tito Simić do liveris la premajn pruvojn, kiuj ŝajnas fari el Tito definitive unikan komunisman krimulon, kaj el civila kaj milita vidpunktoj.

## Tito kiel stalinisto en Sovetunio de la 1930aj jaroj

En la unua parto de sia libro Simić koncentras la atenton sur la rolon de Tito kiel kunlaboranto de Stalin, de Komintern kaj de NKVD en la 1930aj jaroj en Moskvo. La esploroj de Simić klare evidentigas la interplekton de Tito en la stalinismaj purigaj operacoj kontraŭ la propraj partianoj. La partopreno en diversaj krimaj agadoj de la stalinisma sistemo ŝajne estis neevitebla, kvazaŭa kondiĉo por povi forlasi la moskvan lernejon, fari karieron kaj transpreni gravajn funkciojn en la komunisma movado, ekzemple fariĝi ĝenerala sekretario de KPJ. En sia perfida ludo kun la kamaradoj el aliaj landoj la potenca ĉefo en la Kremlo, kiu konis neniujn skrupulojn, metis ankaŭ la jugoslaviajn komunistojn sub premo, same kiel li premis la bulgarajn, polajn kaj aliajn. Neniu estis sekura aŭ protektita kontraŭ intrigoj kaj ĉantaĝoj. Kiam Stalin kaj lia bulgara lakeo Georgi Dimitrov rimarkis la esceptan figuron el Jugoslavio, kiu strebis akiri gvidan pozicion en la komunisma movado, ili estis impresitaj pri la ambicia laboristo el Kroatio kaj klopodis gajni lin por siaj planoj, celoj kaj faroj.

La fontoj de RGASPI,[4] kiujn Simić povis konsulti, parolas klaran lingvon. Apenaŭ alveninte en Moskvo, Tito (kiu ricevis la konspiran pseŭdonomon „Valter“[5]) senprokraste komencis kunlabori kun la funkciuloj de Komintern kaj la agentoj de NKVD. Liaj ´partneroj´ estis la NKVD-agentoj Andreev, Jakubovič, Ivan Karaivanov Spiner kaj Josip Kopinič (-Vokšin). Senskrupule la partiaj kamaradoj devis esti perfidataj, se ili estis suspektataj de la sovetia imperiestro, ke ili faris iun eraron aŭ forlasis la stalinisman linion. Ĉi tiu riproĉo trafis precipe la mentoron de Tito, Milan Gorkić, la gvidanton de KPJ, kiu estis mortpafita en Ljubjanka la 1an de novembro 1937 post kiam li estis akuzita kiel „brita spiono“. Sed ankaŭ ĉiuj ceteraj jugoslavaj partiaj gvidantoj, kiujn Tito perceptis kiel rivalojn, estis traktitaj laŭ la sama maniero: Post kiam ili estis denuncitaj, interalie de „Valter“ mem, ĉe NKVD kiel homoj kun „malbona karaktero“, ili estis liberaj por esti mortpafitaj. Tiel, en la ombro de la stalinisma puriga proceso de la jaroj 1937-39 estis ´oferitaj´ surbaze de la sekreta raportado de Tito ankaŭ aliaj komunistoj: Inter la plej famaj troviĝis tiaj funkciuloj kiel Ivan Grzetić (-Flajšer), KPJ-reprezentanto en Komintern, Đuka Cvijić, eksa sekretario de la CK KPJ, kaj Sima Marković (-Milić), kunfondinto kaj eksa ĝenerala sekretario de KPJ. Ankaŭ pri la kroata komunisto Kamilo Horvatin, la bosnia komunisto Ivan Kralj kaj la slovena komunisto Karel Hudomalj Tito skribis malfavorajn „karakterizojn“, kiuj havis por Horvatin kaj Kralj fatalajn sekvojn, same por Simo Miljuš, redaktoro de iu Komintern-gazeto. Ĉiuj ricevis la mortpunon surbaze de falsaj akuzoj kaj inventitaj pruvoj kaj estis senprokraste likviditaj. Iuj ĉi-koncernaj korespondaĵoj de Tito, kiujn Simić trovis, konfirmis lian kontentecon pri la neniigo de la sovetiaj „trockiistoj“, kiujn Tito konsideris, aŭ devis konsideri kiel „monstrajn krimulojn“.

[2] Germanlingva versio: Pero Simić: Tito – Geheimnis des Jahrhunderts. Eld. Orbis. Ljubljana 2012. Serba originalo: Перо Симић: Тито, тајна века. Београд 2009.

[3] Kiu publikigis la ampleksan libron *Tito in tovariši,* Ljubljana 2011; sbkr. *Tito i drugovi,* Ljubljana 2012.

[4] Ruslanda ŝtata arkivo por socipolitika historio.

[5] Lia kompleta pseŭdonimo estis Fridriĥ Francević Val´ter (Фридрих Францевич Вальтер).

Dum Tito mokis pri kamaradoj, kiujn la laboristo el Kumrovec konsideris kiel „intelektulojn“, kiuj naive „filozofiumas pri la malutileco de tiaj procesoj“, li plendis pri la malforta interesiĝo de la „laboristoj“ en Jugoslavio pri la moskvaj farsprocesoj, kiuj okazis en la 30aj jaroj kontraŭ la „dekstraj“ kaj „maldekstraj“ kritikantoj de Stalin. Kiam post la mortigo de Gorkić la mono de Komintern ĉesis flui en la kason de KPJ, la jugoslavaj kamaradoj ekpanikis. Sed okazis eĉ io pli malbona: Tito ricevis la ege maltrankviligan novaĵon, ke la CK de KPJ estis malfondita de Komintern. Por savi ´sian´ partion de la pereo kaj eviti la konkurencon de la rivaloj Marić kaj Kusovec, kiuj fondis en Parizo proprainiciate novan KPJ-gvidstrukturon, Tito, kiu subite staris sola en la pejzaĝo, devis rapide agi, se li mem ne volis fariĝi viktimo de la purigoj kiel superflua ´aktoro´. Tio signifis, ke li devis montri sian absolutan lojalecon al la stalinistoj en Moskvo kaj al Stalin persone, por havi realan ŝancon fariĝi posteulo de Gorkić. Georgi Dimitrov, kiu gvidis Kominternon kun la tolero de Stalin,[6] klarigis al sia jugoslava „amiko“ la danĝeran problemon de la frakciismo kaj ankaŭ sciigis al li, kiujn personojn oni, t.e. Stalin, ŝatus vidi ĉe la pinto de la nova KPJ-gvidkomando.[7] Sed ´senpage´ Tito ne povis ricevi tion, kion li deziris, sen fari adekvatan servon aŭ komplezon, t.e. plenumi kelkajn gravajn taskojn.

## Kiel longigita mano de Stalin en Hispanio

Ĉi tiu ´rekompenca´ aŭ ´kompleza´ servo konsistis konkrete en tio, ke Tito, kiu intertempe mem fariĝis radeto en la murda sistemo de Stalin, devis plenumi la malpuran laboron por la sovetia sekreta polico, kion li ankaŭ faris. Tiucele Tito estis sendita al Hispanio, kie furoris la Civila Milito inter la popolfronta registaro de la dua hispana respubliko kaj la dekstremaj puĉistoj de generalo Franco (kiuj gajnis la militon). La restado de Tito en Hispanio formas blankan makulon en la oficiala Tito-biografiko. Kvankam diversaj kamaradoj kiel Dolores Ibarruri kaj Miroslav Krleža konfirmis kaj diversaj okcidentaj sekretservoj sciis, ke fine de 1936 Tito restadis en Hispanio (ĉefe en Barcelono kaj Albacete), Tito scipovis dumvive kaŝi tiujn faktojn. Al Dedijer Tito eĉ strikte malpermesis ripeti en la biografio, kiu estis aŭtorizita de li, kion li diris en iu intervjuo al la usona gazeto *Life*. Laŭ tio li pasigis nur unu tagon en Madrido kaj ne estis enmiksita en la batalojn de Hispanio. Ĉi tiu eldiro eble estas ĝusta, sed la reston de la vero de lia hispania ´engaĝiĝo´ la publiko ne devis ekscii. En Moskvo Simić malkovris ĝis nun nekonatan kaj sekretan biografion pri Tito, en kiu estas skribite, ke Tito „partoprenis en la naci-revolucia milito de la hispana popolo (1936-1939)“, kion ajn tio signifas. Por pruvi, ke Tito efektive estis en Hispanio, Simić menciis du fontojn, kiuj devis scii ĝin. La unua fonto koncernas eldiron, kiu estis farita de iu Georgi Damjanov, kiu estis gvida EKKI-funkciulo en Moskvo kaj en la 50aj jaroj laboris kiel bulgara ministro pri defendo (en la jaroj 1950-58 li eĉ estis formala ŝtatestro de la komunisma popolrespubliko). Kiel „generalo Belov“ tiu Damjanov inspektis la Internaciajn Brigadojn. Kiam Damjanov foje akceptis la novan ambasadoron de Tito en Sofio, li aludis, ke „kamarado Valter“ estis sendita de li al Hispanio, por ke tiu „bone plenumu“ sian laboron kiel agento de Komintern.[8] La dua atestanto estis la nomita slovena komisaro Josip Kopinič, kiu tiam estis altranga sovetia agento en Hispanio; li sciis por kiuj taskoj la specialaj servoj de Stalin sendis Titon al Hispanio. Laŭ Kopinič, kiu rakontis tion al Dedijer, Tito devis, kiel inspektoro de iu sekcio de NKVD, transpreni parton de la taskoj de Gorkić, kiuj antaŭvidis inter alie la likvidon de malamikoj en eksterlando, kiuj estis konsiderataj de Stalin kiel „trockiistoj“ kaj „malkaŝitaj perfiduloj en la servo de Franco“. La eldiroj de Kopinič eĉ estis konfirmitaj de Maurice Thorez, ĝenerala sekretario de KPF. Alia dokumento (kiu trafis ankaŭ la manojn de Dedijer, sed kiu neniam estis publikigita) atestis, ke Tito estis la ĉefo de tiu „likvida stabo“. Kiel membroj apartenis al tiu stabo ankaŭ la itala komunisto Vittorio Vidali, la kroatoj Ivan Krajačić kaj Ivan Srebrenjak kaj la bosnia serbo Vlajko Begović. La fonon de ĉi tiu historio finfine malkovris Leo Mates, kiu tiam funkciis kiel estro de la prezidenta administrejo de Tito en Zagrebo. Al la demando, kiamaniere Tito fariĝis ĝenerala sekretario de la CK de KPJ, Mates respondis en 1983, ke Tito „plenumis la malpurajn

---

[6] Komintern mem estis malfondita en majo/junio 1943 kaj ĉesigis sian laboron. Por Stalin ĝi ne plu estis utila. Dimitrov fariĝis kvazaŭ superflua kaj senlabora, sed unu jaron poste li estis sendita al Bulgario por enkonduki la komunisman „revolucion“, kiu estis ligita kun novaj krimoj. Pri Georgi Dimitrov, lia rolo en la stalinisma sistemo kaj lia rilatoj kun Tito vd. sub http://www.planlingvoj.ch/Georgi_Dimitrov_Bulgario.pdf.

[7] Nome Đilas, Ranković, Kardelj, Marinko, Leskošek, Kraš kaj Valter/Tito. Ĉi tiu embarasa citaĵo mankas en la Verkaro de Tito. (Simić, germ., p. 79).

[8] La tiama jugoslavia ambasadoro Mito Miljković, kiu memoris tiun epizodon, rakontis ĝin al la serba verkisto Dragoslav Miĥailović, kiu pludonis ĝin en 2011 al Pero Simić.

aferojn en Hispanio“ kaj ke tie li „purigis la homojn“. Simić insistas, ke li estu konsiderata kiel unua, kiu publikigis ĉi tiun ĝis nun nekonatan epizodon en sia libro. Sed la historio ankoraŭ ne estas finita.

La 24an de septembro 1983 Dedijer eksciis en la domo de Mates, ke Tito organizis ankaŭ la mortigon de Blagoje Parović, kiu okazis la 6an de julio 1937 en la proksimeco de Madrido. Kiu estis Blagoje Parović? Ĉe tiu elstara jugoslava komunisto temis pri esperplena kandidato, kiu estis antaŭvidita kiel nova pintulo en la CK de KPJ, kaze ke Gorkić aŭ Ćopić estas arestita. Tuj post la murdo de Parović, en kiu laŭ Peko Dapčević Tito partoprenis, la kadavro estis fotita (vd. la bildon sur p. 95) por pruvi, ke la tasko estis plenumita. Por kaŝi kaj nebuligi la krimon, Tito diris kelkajn monatojn post lia mortigo, ke Parović estis „unu el la plej bonaj membroj de la CK de KPJ“ kaj ke lia morto estis „heroa“. Kiel dankon por la ´brila´ murdoperaco en Hispanio la du aliaj membroj de la „likvida stabo“, Krajačić kaj Begović, ricevis poste altajn postenojn en la komunisma Jugoslavio: Krajačić fariĝis ĉefo de la sekreta servo en Kroatio kaj Begović direktoro de gvidaj ekonomiaj kaj sciencaj institucioj! Ju pli krimeca estis la pasinteco de iu komunisto, des pli altajn postenojn li ricevis en la „socialisma“ ŝtato – tia praktiko ne estis kutima nur en Jugoslavio. Vidali, kiun oni devas konsideri kiel aparte dubindan figuron, fariĝis unu el la ikonoj de la itala KP.

Alia viktimo de la titoisma venĝemo, kiu estas traktita de Simić, nomiĝis Živojin Pavlović. Ĉi tiu respektinda ĵurnalisto, kiu eldonis la partian organon *Proleter*, publikigis en 1940 libron kun akra kritiko pri Stalin: En tiu libro estas menciita ankaŭ la fiaskinta ekspedicio de Tito de la komenco de 1937, kiam ĉirkaŭ 500 jugoslaviaj libervoluloj devis esti senditaj perŝipe al Hispanio (pri ĉi tiu epizodo oni povas legi ankaŭ en la Tito-biografio de Dedijer). De la kritiko Tito sentis sin persone koncernata, kun fatalaj sekvoj. Unu jaron poste Pavlović estis arestita kaj, post kruela turmentado, mortpafita. Tiumaniere en Sovetunio pereis laŭ Dedijer ĉirkaŭ 800 jugoslaviaj politikaj elmigrintoj.

Kiam komence de 1939 Tito revenis al Jugoslavio, li kunvokis la supre menciitan KPJ-gvidkoterion plus Ivo Lola Ribar al Bohinj en Slovenio por kunsido, en kiu laŭ la protokolo estis decidita kvazaŭ la kronado de la partia purigo: „ĉiuj iamaj gvidaj kaj frakciaj elementoj, kiuj estis malamikaj al la partio, estis eliminitaj el la KPJ“. Ĉi tiu eliminado ampleksis ĉiujn iamajn gvidantojn de KPJ ekde la fondo de la partio en la jaro 1919. Ili ĉiuj estis deklaritaj kiel herezuloj, frakciistoj kaj malamikoj, ĉefe pro tio, ke laŭdire ili laboris kontraŭ Tito. Eliminenda estis ankaŭ jena partia rivalo – Petko Miletić laŭ la sekvanta maniero.

Tito troviĝis en Istanbulo, de kie li atendis la forigon de Miletić. Kvazaŭ laŭ mendo li estis tirita antaŭ la tribunalon en Moskvo kun la akuzo pri „frakciismo“ kaj „trockiismo“; post tio li estis rapide mortpafita kiel „perfidulo de la partio“. Poste Tito klarigis, ke li timis la popularecon de tiu homo. Post kiam KPJ do estis purigita de ĉiuspecaj potencialaj Tito-konkurentoj kaj supozeblaj Stalin-kontraŭuloj, la vojo akapari la povon fariĝis libera por Tito. En oktobro 1940 en Zagrebo okazis la elekto de la nova CK de KPJ. Kiuj personoj estis „elektitaj“ dum tiu sekreta „baloto“ neniam fariĝis publike konate. Pri la elekto de la ĝenerala sekretario de KPJ ekzistas 17 versioj. Tiel, Josip Broz Tito povis regadi Jugoslavion dum tri jaroj kiel diktatoro sen okazigi eĉ nur unu konsidon de la CK. La citaĵo de Tito, kiun Dedijer aldonis en siaj tekstoj, ke li, t.e. Tito „ne havis ambiciojn transpreni la gvidon de la partio kaj neniam pensis pri tio“, devas esti konsiderata kiel pura hipokriteco kaj falsa modesteco.

En 1956 Gorkić estis rehabilitita de KPJ. En 1960 Tito persone subtenis la ideon de la rehabilitado de aliaj jugoslaviaj komunistoj, kiuj fariĝis viktimoj de la stalinisma teroro. Li kondutis kvazaŭ li bedaŭrus ilian pereon. Novan klopodon redoni la honoron al tiuj kamaradoj Tito faris en 1964 sed sen nomi konkretajn nomojn de viktimoj. En decido de septembro 1968 la CK de la Ligo de Komunistoj de Jugoslavio, kiel KPJ nun nomiĝis, estis dirite, ke la „rehabilitado de tiuj personoj ne estas necesa“, ĉar ili „ne estis kondamnitaj aŭ punitaj de la partio“ [t.e. de KPJ ]. En 1969 Tito emfazis, ke „la LKdJ por ĉiam konservos la memoron pri tiuj kamaradoj“, kaj en 1977 li eĉ skribis, ke oni devus rehabiliti ĉiujn tiujn kamaradojn. Sed la afero restis nesolvita kaj perdiĝis en la sablo.

Estas klare, ke sen precizaj konoj de la koncernaj okazaĵoj en la 30aj jaroj estus neeble verki kompletan politikan biografion pri Tito. Ĉiu Tito-biografio, kiu malatentus la kritikon de Đilas, la novajn kontribuaĵojn de Dedijer, la analizon de Halder (vd. sube) pri la kulto ĉirkaŭ Tito kaj la gravajn kompletigojn de Simić, kaj kiu daŭrigus la tradiciojn de la Tito-biografiado, ne povus konformi al la sciencaj postuloj kaj atendoj kaj devus esti konsiderata kiel malinteresa kaj senvalora hagiografiaĵo.

## Likvido de militaj kontraŭuloj per ĉiuj rimedoj

Per la menciitaj kazoj la krima energio de Josip Broz Tito estas en principo pruvita. Sed la historio de Tito kiel komunisma kanajlo ankoraŭ longe ne estas finita, ĉar, kiel ŝajnas, se oni iam fariĝis krimulo, oni restos dumvive krimulo.

Ankoraŭ dum la dua mondmilito Tito partoprenis en diversaj krimaj decidoj kaj agadoj, kiuj estas traktitaj de neniu oficiala Tito-biografio. Post la germana atako kontraŭ Belgrado Tito eldonis sloganon, laŭ kiu oni devis ĉiurimede kontraŭbatali la malamikon kaj akceli la socialisman revolucion: Prefere oni mortu ol kapitulacu antaŭ la malamiko. La preteco de ĉiu soldato fariĝi viktimo devis esti totala. La „senkompromisa kaj senkompata forigo de civilaj kaj militaj gvidantoj kaj de ĉiuj aliaj popolaj malamikoj“ devis esti „la devo de la revoluciuloj“. Per „ĉiuj eblaj“ rimedoj oni devis lukti: Per „pafiloj kaj pistoloj, maŝinaj fusiloj, bomboj, grenadoj, dinamito kaj aliaj eksplodaĵoj, per tranĉiloj, batoringoj, feraj stangoj, oleaj lampoj, ŝnureskaloj, pikdrato, najloj, ŝpatoj, marteloj, fajliloj, ktp.“ Evidente, tiuj instrumentoj apartenis al la preferataj armiloj de Tito, kiel oni scias el la 20aj jaroj, kiam simila materialo estis trovita en konspira loĝejo en Zagrebo, kie Tito kaŝiĝis. Cetere, la supozata krima aktiveco de Tito en Kroatio en la 20aj jaroj estus ankoraŭ pli profunde esplorenda.

## La ĉetnikoj de Draža Miĥailović kaj iliaj rilatoj kun la Tito-partizanoj

El Moskvo Tito ricevis la konsilon, ke Jugoslavio unue liberigu sin de la „faŝisma sklaveco“ kaj nur poste pensu pri la „socialisma revolucio“. La sovetianoj eĉ postulis de la partizanoj de Tito, ke ili kunlaboru kun la ĉetnikoj de Dragoljub (Draža) Miĥailović. Kiel Dedijer skribis en sia libro *La perdita batalo de Stalin* (1970, germana eldono, p. 49), ankoraŭ en 1941 Sovetunio diplomatie agnoskis, je la konsterniĝo de la Tito-partizanoj, la registaron en la londona ekzilo kaj ties militan ministron Draža Miĥailović, antaŭ ol Moskvo konfesis aŭ konfirmis lian perfidon. Pri tiu opcio Tito, kiu timis Miĥailović-on kiel politikan konkurenton, ne povis estis interesata. Sed Tito bone sciis, ke la movado de Miĥailović povus esti subtenata de la okcidentaj aliancanoj kaj, eĉ pli terure, ke la komunistoj ne estas sufiĉe popularaj ĉe la popoloj de Jugoslavio, kiuj parte ankoraŭ nostalgiis pri la reĝa dinastio de Karađorđe, precipe en Serbio. La burĝa pasinteco de Serbio kompreneble estis dorno en la okuloj de la komunistoj.[9] Por elŝalti la ĉetnikojn la titoistoj ne hezitis kunlabori ankaŭ kun la nazioj. Tiel okazis ke Đilas, Popović kaj Velebit renkontiĝis komence de septembro 1942 kun reprezentantoj de la germanaj nacisocialistoj kaj de la kroata Ustaŝo-reĝimo por diskuti pri la interŝanĝo de militkaptitoj kaj pri la detruado de la komuna malamiko, la ĉetnikoj de Draža Miĥailović. Ĉe tiuj intertraktoj, kiuj okazis en marto 1943 en Gornji Vakuf, la partioj interkonsentis, ke la germanoj lasu la „popolan naciliberigan armeon“ de la Tito-partizanoj en paco kaj ke reciproke la ĉi-lastaj ne batalu kontraŭ la germanoj kaj la kroata Ustaŝo-ŝtato. Dum la sekvantaj interparoladoj kun la germanoj, kiuj okazis en Zagrebo, la reprezentantoj de Tito (Đilas kaj Velebit) certigis, ke la germanoj ne timu problemojn kaj damaĝojn kaj ke por la komuna detrua batalo kontraŭ la ĉetnikoj kaj ĉe la interŝanĝo de malliberuloj Tito ne atendos „reciprokan servon“ de la germanoj. Sian batalon kontraŭ la ĉetnikoj la Tito-partizanoj pravigis per la averto, ke la ĉetnikoj celas la starigon de Grandserbio kaj ke la „hegemonio de la serboj en tiu ŝtato ne estus bona“. Memorinda estas la fakto, ke ankaŭ la serbaj ĉetnikoj, kiuj pledis por la kontinueco de la jugoslavia reĝlando, parte kunlaboris kun la germanaj okupantoj.

Do, aperis la paradoksa kaj absurda situacio, ke kaj la ĉetnikoj de Draža Miĥailović kaj la partizanoj de Tito kunlaboradis kun la germanoj kun la celo detrui sian malamikon. Ne nur Stalin miris, ke la titoistoj renkontiĝis kun la germanaj nazioj. Ankaŭ la gvidanto de la serbaj komunistoj, Blagoje Nešković, montris sin profunde ĉagrenita, post kiam li eksciis, ke malliberuloj estas interŝanĝataj kun la germanoj. Li plendis, ke la serbaj komunistoj tute ne povis profiti de tiu interkonsento, dum la „plej bonaj kamaradoj“ devas perdi sian vivon en „pafado kaj masakroj en la malliberejoj“. Ŝajnas, ke la operaco kontraŭ la ĉetnikoj, kiu devis esti brutale efektivigita kune kun la nazioj, finfine direktis sin ankaŭ kontraŭ la serboj kaj la serba hegemonio, kiun la titoistoj timis. Fakte, dekmiloj da serboj pereis dum la Ustaŝo-teroro. Post kiam Nikola Kalabić, unu el liaj komandistoj, perfidis lin, la 13an de marto 1946 Draža Miĥailović finfine estis arestita de agentoj de OZNA, kiuj estis kaŝitaj kiel ĉetnikoj, en la serbia-

[9] Laŭ Svetozar Vukmanović (-„Tempo“) en *Mia vivo kun Tito* (germana eldono, 1972, p. 107), Tito emfazis fine de 1941, ke la komunismaj partizanoj devas kunlabori kun la ĉetnikoj sed sen identiĝi kun ili.

bosnia limregiono. Post stalinismeca farsproceso Miĥailović estis kondamnita al morto kaj pafekzekutita la 17an de julio kune kun naŭ aliaj akuzitoj.

## Jugo-stalinismo …

Pro tio, ke la serboj ne montris apartan entuziasmon por la komunismo kaj ne varme bonvenigis la Tito-partizanojn en Belgrado, la komunistoj kruele venĝis sin. Interkonsente kun la jam menciita komunista gvidanto Blagoje Nešković (kiun „Tempo“ abomenegis) estis kompilita listo de intelektuloj, kiuj estis likvidendaj pro sia opozicio kontraŭ la komunistoj. Sur tiu listo troviĝis la nomoj de funkciuloj de la Demokratia Partio sed ankaŭ tiuj de ministroj de la serba intermilita registaro, krom tio la nomoj de diversaj ĵurnalistoj kaj akademiuloj. Miloj da laŭdiraj „popolaj perfiduloj“ estis malliberigitaj en koncentrejoj, kaj ilia posedaĵo estis konfiskita de la gvidaj protagonistoj de la Tito-reĝimo. Pri la teroro kontraŭ la opoziciaj intelektuloj respondecis la fifama sekreta servo OZNA kaj la „Korpuso de la popola defendo“ (KNOJ). En la „liberigita“ Serbio ĉi tiuj organizaĵoj devis efektivigi purigadojn kaj likvidi „bandojn“. Leĝoj, kiuj devintus reguligi tiujn punagojn, ĝis 1951/3 ne ekzistis. En tio Tito persone donis la permesojn por la mortpafado de la malamikoj kaj opoziciuloj, kiuj devis esti sekrete efektivigitaj (sur p. 159 Simić prezentas ĉi-koncernan dokumenton, kiu devus pruvi tiun aserton).

Koncerne la forpuŝadon de kontraŭuloj, politikaj opoziciuloj kaj homoj kun aliaj opinioj devis enkalkuli en Jugoslavio la samajn riskojn kaj sekvojn kiel ili estis kutimaj ekzemple en najbara Bulgario, kie la stalinismo same furoris kaj kie la komunistoj laŭ rekta ordono de Stalin kaj de lia satrapo Dimitrov kruele persekutadis la burĝan (t.e. „monarkia-faŝisman“) eliton kaj la kunlaborantojn de Germanio. Sole en Belgrado ĉirkaŭ dudek prizonoj kaj mortpafejoj, kaj la arbitre efektivigitaj mortpafadoj ĉesis nur fine de 1945. Ankaŭ en Kroatio, kien la Tito-partizanoj enmarŝadis, kapoj amase ruladis, kiel Simić notis. Edvard Kardelj (1910-79), la slovena ĉefideologo de Tito, parolis pri la neceso de la „senkompata persekutado“ kaj „fizika ekstermado“ de la kontraŭuloj (ĉi tiu fivorto estis populara kaj sub Hitler kaj sub Stalin). Agento Jefto Šašić ricevis la ordonon „mortigi“ tiujn homojn, kiuj rifuzis esti „indulgitaj“. Šašić transportis la ordonon al Slovenio, kie ĝi estis senprokraste efektivigita en majo 1945 ĉe miloj da enlandaj Tito-kontraŭuloj, t.e. ĉe la batalantoj de Ustaŝo kaj de la ĉetnikoj sed ankaŭ ĉe kroataj kaj slovenaj memdefendantoj („domobrancoj“),[10] ĉe adeptoj de la serba generalo Nedić kaj de la konservema politikisto Ljotić. Miloj da potencialaj viktimoj, kiuj fuĝis al Aŭstrio, estis resenditaj de la britoj (!) al Jugoslavio kaj transdonitaj al la ekzekutistoj de Tito. Oni kalkulis 191´790 malliberulojn, inter kiuj estis 30´000 etnaj germanoj, kiuj staris fronte al sia mortosorto. Post kiam Kardelj en 1944 esprimis la ideon aneksi la sudan parton de Aŭstrio kun la helpo de aŭstraj komunistoj, Tito ordonis al sia tria armeo la 15an de majo 1945 okupadi la „parton de la aŭstra limregiono“, kiu estis kontrolata de armeanoj de la sovetia marŝalo Tolbuĥin, komandisto de la 3a Ukraina Fronto. Ivan Maček, kiu tiam estis ministro pri internaj aferoj de Slovenio, konfirmis al Dedijer la verecon de ĉiuj tiuj krimoj, kiuj estis persone ordonitaj de Tito en Kroatio kaj Slovenio. Post la kolapso de la Tito-reĝimo en Slovenio estis malkovritaj pli ol 600 amastombejoj, kiuj estis la rezulto de la venĝemo de Tito. Miloj da viktimoj estas supozataj en perbetone fermitaj minejoj, kie ili estis murditaj de la titoismaj bandoj per gaso. Jože Dežman ricevis la taskon esplori tiujn amastombejojn.[11]

## … kaj la genocido kontraŭ la germanoj de Jugoslavio

La plej granda (kaj ne plej lasta) krimo de Tito direktis sin kontraŭ la etnaj germanoj de Jugoslavio, kiujn oni strebadis, cetere kunlabore kun la sovetianoj, forpeladi kaj neniigi. La unua pogromo kontraŭ la t.n. danubaj ŝvaboj okazis en oktobro 1944 en Vršac en Vojvodino, kie 1083 anoj de tiu etna minoritato estis mortigitaj. Poste la purigado en la vicoj de la jugoslaviaj germanoj vastiĝis en tuta Banato kaj aliaj najbaraj regionoj, kie la germana popolo sub la kondiĉoj de la milita juro ricevis la kolektivan punon kaj

[10] En Slovenio temis verŝajne pri ĉ. 50´000 tiaj viktimoj.
[11] Alia(j) masakro(j) al diversaj kroataj soldatoj kaj civiluloj, kiu(j) estis ordonita(j) de Tito kaj efektivigita(j) de Tito-partizanoj, okazis 1943-45 en Sošice/Jazovka, Kroatio (vd. http://www.spiegel.de/spiegel/print/d-13492681.html kaj https://de.wikipedia.org/wiki/Jazovka). La patro de Josip Zoretić, kiu mem fariĝis viktimo de la Tito-stalinisma kaj verkis memuaron pri Goli Otok, kien li estis deportita en 1962, estis mortigita kaj malaperigita en la groto de Jazovka, ĉar li rifuzis aliĝi kiel soldato al la komunismaj Tito-partizanoj.

estis deportita en laborkoncentrejojn de Jugoslavio kaj Sovetunio. La rabita posedaĵo de la germanoj estis konfiskita kaj la mono estis ĝirita sur la konton de la Centra Komitato de KPJ. Laŭ la censo de 1948 restis nur 55´537 de iam ĉirkaŭ 600´000 jugoslaviaj germanoj. La persekutado, forpelado kaj ekstermado de la etnaj germanoj de Jugoslavio apartenas al tiuj genocidoj (aŭ etnocidoj), kiuj apenaŭ estis publike traktataj en la postmilita Eŭropo, ĉar inter alie ĝi estis praktike forpuŝita de la sudetgermana ´konkurenco´, kiu disponis fortan lobion en Germanio kaj pretendis esti traktata prioritate. Krom tio, Tito ne devis esti provokata kaj ĉagrenata de tiaj malagrablaj temoj. Tiuj apenaŭ konataj krimoj kontraŭ la germana popolgrupo de Jugoslavio tute ne malhelpis al Tito jam en 1950 cinike deklari, ke la germanoj estas „talentata kaj diligenta“ popolo, kaj postuli la unuiĝon de Germanio. Probable temis pri aliaj germanoj.

## Tito kiel mensoganto, prisilentanto kaj malamiko de la demokratio

Kiel Simić emfazis en la dua parto de sia libro, Tito estis granda mensoganto kaj blufulo, kiu perfekte kapablis nutri sian partion per falsaj informoj pri la vera stato de la partizanaj taĉmentoj, kiuj ĉie suferis gravajn perdojn kaj mankojn. La starigon de la jugoslavia potenco li atingis en Jajce en pseŭda voĉdono, kiu estis efektivigita helpe de obeeme aplaŭdantaj partiaj soldatoj. Li lasis sin kultece gloradi kiel mem elektitan marŝalon kaj trompis sian ´amikon´ Churchill-on per fabeloj pri siaj veraj politikaj intencoj koncerne la postmilitan ordon en Jugoslavio. Tito donis kompreni, ke demokratie gvidataj diskutoj ne interesas lin kaj ke kritikon li tute ne deziras. Al la jugoslavia publiko oni kaŝis ĝis 1989 ankaŭ la ciferojn pri la sovetia milita interveno en Jugoslavio, kiu en 1944 estis efektivigita de la bulgara flanko: 414´000 sovetiaj soldatoj tiam enmarŝis en Jugoslavion laŭ peto de Tito al Stalin sub la preteksto, ke oni forpelu la germanojn. Ŝajnas, ke la Ruĝa Armeo venis al la konkludo, ke la enkonduko de la komunisma diktaturo en Jugoslavion bezonas armean ´helpon´, ĉar la subteno de la komunistoj flanke de la popoloj de tiu balkana lando estis malforta, precipe en Serbio; fakte ekzistis la timo, ke ĝi povus esti entute perdita por la komunismo. En Kosovo kaj Metoĥio la foriro de la nacisocialistoj eĉ estis bedaŭrata de la albanoj, ĉar la germanoj almenaŭ promesis al ili la fondon de grandalbana ŝtato kaj la hegemonion super Serbio. En la armata ribelo *kontraŭ* la serbaj kaj jugoslaviaj *antifaŝistoj* en tiu provinco partoprenis pli ol 30´000 albanoj, dum la naziaj okupantoj estis kontraŭbatalataj de ne pli ol kelkcent albanoj.

## Provizora bilanco

Fine de la dua mondmilito la jugoslavia bilanco do estis en ĉiu rilato katastrofa: La „faŝistoj“ povis esti forpelataj de la lando nur kun granda peno, kun nemezureblaj homaj perdoj en la propraj vicoj kaj nur per la subteno de la aliancanoj kaj de la sovetia armeo. Centmiloj da homoj estis lezataj aŭ mortigitaj. La serba reĝa dinastio devis abdiki; la komunisma Tito-regado estis minacata de fiasko kaj povis esti savita nur dank´ al stalinismaj metodoj, per rekta enmiksiĝo de Moskvo en la internajn aferojn de Jugoslavio (de la menciita sovetia invado ĝis la sendado de t.n. armeaj konsilistoj) kaj interne per elŝaltado de ideologiaj kontraŭuloj. Ĉio tio finiĝis en nova diktaturo, kiu estis aŭtokrate gvidata de la komunistoj. Jugoslavio ricevis konstitucion laŭ sovetia modelo kaj komencis ŝtatigi la ekonomion. Laŭ la imagoj de Kardelj Jugoslavio devis fariĝi 16a respubliko de Sovetunio. Draža Miĥailović estis mortpafita, kardinalo Stepinac en Kroatio estis kondamnita al multjara aresto en malliberejo, parlamentaj kritikistoj kiel Dragoljub Jovanović, belgrada profesoro pri juro kaj prezidanto de la Serba Kamparana Partio, estis silentigitaj de la titoistoj post falsaj riproĉoj kaj akuzoj. Diversaj kontraŭuloj de Tito kaj grupoj, kiuj estis suspektataj pro kunlaborado kun la militaj malamikoj, estis mortigitaj aŭ deportitaj en laborkoncentrejojn. Kiu en la „nova“ Jugoslavio rifuzis subteni la komunistojn, tiu perdis la voĉdonrajton aŭ suferis alispecajn malavantaĝigojn kaj diskriminaciojn. La urbo Belgrado estis forte detruita dum la bombado flanke de germanoj kaj aliancitoj, la ekonomio de Jugoslavio kolapsis kaj estis ruinigita, la enkonduko de la socialismo, ligite kun rigida ideologia dogmismo, prokrastis la ekonomian prosperon de la lando.[12] La etnaj problemoj estis nur supraĵe solvitaj. La balkana federacio inter Jugoslavio, Bulgario, Albanio kaj aliaj landoj, kiu estis planata de Tito, Dimitrov kaj Stalin, ne realiĝis. La eksteraj rilatoj de Jugoslavio kun ĉiuj najbaroj estis malbonaj kaj troviĝis en daŭra krizo. Pri la fantasta plano okupadi parton de Aŭstrio kun la celo akapari la industrion de tiu lando la jugoslavoj devis rezigni sub la premo

[12] Svetozar Vukmanović (-„Tempo“) abunde raportis en sia libro pri la ĉi-koncernaj problemoj, malfacilaĵoj kaj komplikaĵoj.

de la okcidentaj aliancanoj, kiuj minacis, ke ili bombados la urbojn de Jugoslavio, kaze ke la jugoslavoj realigos la anekson.

Alia afero estis, ke pro la kaprica sinteno de la orgojlaj generaloj de Tito, sur la batalkampoj de Sirmio[13] mortis ĉirkaŭ 37´000 junaj viroj, ĉefe serbianoj. La demando, ĉu ekzistas iu rilato inter ĉi tiu tragedio kaj la cirkonstanco, ke la „kroato“ Tito batalis dum la unua mondmilito ĉe la serbia fronto, kaj la demando, ĉu ankaŭ Tito eventuale portis parton de la kulpo pri la ´genocido´ kontraŭ la serba popolo, staras sur alia folio kaj ĝis hodiaŭ ne estas findiskutitaj kaj responditaj en Serbio.

## Postmilita daŭrigo: Kiel la skismo de Tito kun Stalin estis stilizita de la jugoslavoj kiel propra heroaĵo

Psikologie sed ankaŭ politike kaj ekonomie plej malbone tamen efikis el tiama jugoslavia vidpunkto la skismo kun Stalin en la jaro 1948, kvankam tiu evento en principo malfermis ankaŭ novajn perspektivojn kaj ŝancojn por la evoluo de Jugoslavio. Evidente ili ne estis sufiĉe utiligitaj sed bremsitaj pro la enkonduko de la komunisma sistemo, kiu signifis subpremadon de kapitalismaj principoj.

La genezo, motivoj kaj kaŭzoj de la kverelo inter Stalin kaj Tito, inter la sovetianoj kaj jugoslavoj, kiu neeviteble, logike kaj rekte kondukis al profunda krizo de la rilatoj inter Moskvo kaj Belgrado, do inter Sovetunio kaj la Orienta Bloko unuflanke kaj Jugoslavio aliflanke, estas en principo konataj. La koncernaj cirkonstancoj estis ne nur detale priskribataj de aŭtoroj kiel Đilas, Dedijer kaj Vukmanović sed ĝissate reproduktataj precipe de la jugoslavia propagando mem. Ŝajnas, ke la jugoslaviaj komunistoj ne enkalkulis la konflikton kun Stalin, al kiu ili ĉiam montris sin senlime lojalaj, fidelaj kaj hipokritemaj, ĉar ili planis ´konstrui la socialismon´ flanke de kaj kune kun Sovetunio. Pro tio, tiu sensacia historia krizo devis esti konsiderata de la jugoslaviaj komunistoj kiel aparta traŭmato, kiu estis malfacile digestebla. La kverelo inter ambaŭ flankoj estis kaŭzita pro principaj demandoj de la reciprokaj kunlaboro kaj interdependeco kaj konkretigita pro jenaj pretekstoj kaj incidentoj: La multnombraj sovetiaj armeaj konsilistoj, kiujn Stalin sendis al Jugoslavio, estis dornoj en la okuloj de Tito, ĉar la sovetianoj arogante kaj altrudiĝeme enmiksiĝis en la internajn aferojn de Jugoslavio kaj klopodis ekspluati la resursojn de la lando.[14] Du sovetiaj kuracistoj estis suspektataj, ke ili volis veneni Titon kaj lian registarestron. Due, Stalin riproĉis al Tito, ke li tro memstare intertraktis kun Albanio pri politikaj, armeaj kaj aliaj aferoj sen konsulti la opinion de Moskvo. Kvankam la jugoslavia flanko neis la ekziston de miskomprenoj inter Tito kaj Stalin, la malfidema diktatoro en la Kremlo insistis pri sia versio, laŭ kiu temas pri intencata kontraŭsovetia sinteno (la saman riproĉon Stalin direktis ankaŭ al la komunistoj de Bulgario, kiam koncerne la balkanan federacian projekton Dimitrov komencis agi memstare). La kaŭzo de la rompo kun la sendependemaj jugoslavoj do probable konsistis precipe en la kronika kaj paranoja malfido de Stalin rilate al eksterlandaj komunistoj, kiuj celis emancipiĝi kaj distanciĝi de Sovetunio por serĉi la ´propran vojon al la socialismo´, kio certe ne povis plaĉi al la estro en Moskvo, kiu strebis akiri la plenan kontrolon super la tuta komunisma mondo, almenaŭ en Eŭropo. Tial Stalin admonis la jugoslavojn, kiujn li konsideris „tro arogantaj“, ke ili ne forgesu, ke la jugoslaviaj komunistoj sukcesis krei la „necesajn kondiĉojn por transpreni la povon de KPJ“ en 1944 nur dank´ al la sovetia armea subteno. Kiam la argumentoj elĉerpiĝis, la sovetianoj riproĉis al la jugoslavoj (kaj aliaj), ke ilia KP „forlasis la marksismon-leninismon en fundamentaj demandoj de la ekstera kaj interna politiko“, kio faris la vojon libera por ´adekvate´ trakti la ´perfidulojn´. La sovetianoj eĉ akuzis la jugoslavojn, ke ili estas faŝistoj. Ĉi tiun fian taktikon Stalin adoptis ankaŭ en la kazo de KPJ por povi premi kaj ĉantaĝi la jugoslaviajn kolegojn.

Cetere, en 1949 ĉi tiu jugoslavia krizo povintus preskaŭ konduki al sovetia armea invado en Jugoslavion, kontraŭ kiu la jugoslavoj pretis defendi sin, kiel Vukmanović rakontis en sia libro. Do, iusence la jugoslavia krizo anticipis postajn scenarojn en aliaj landoj de la Sovetia aŭ Orienta Bloko (kiel GDR 1953, Berlino 1961, Hungario kaj Pollando 1956, ĈSSR 1968 ktp.), kie la sovetianoj kaj ties obeemaj aliancanoj de la Varsovia Pakto senskrupule kaj per plena armea forto decidis interveni kaj disbati la popolajn ribelojn. Pri la danĝera situacio de tiu jaro oni nuntempe apenaŭ plu konscias, ĉar feliĉe la sovetia invado kontraŭ Jugoslavio finfine ne okazis. Pri la minaco de sovetia invado Tito poste diris: „Kiu aŭdacas ataki Jugoslavion, tiu devos enkalkuli novan partizanan militon.“

---

[13] Sbkr. Sr(ij)em, historia regiono inter Kroatio kaj Serbio, inter la riveroj Danubo kaj Savo.

[14] La arogantan konduton de la sovetianoj Dedijer prikantis en sia libro *La perdita batalo de Stalin.*

Spite al la ege amara sperto, kiun la jugoslaviaj komunistoj devis fari dum la skismo kun Sovetunio, kiu krude ekskomunikis la jugoslavian KP el la „socialisma familio", ĉi tiu unika historia evento estis poste apodikte reinterpreteta de la oficialaj jugoslaviaj historiistoj (precipe de Dedijer) kiel akto de la emancipiĝo de Jugoslavio disde Sovetunio kaj stilizata kiel parto de la jugoslavia heroisma mitologio. Kiel Simić emfazis, ankaŭ post la proskribo de la jugoslavoj fare de Stalin kaj ilia eksigo el la Buroo de Kominform[15] la ideologia mondkoncepto de Tito kaj lia principa adora sinteno aŭ rilato al Stalin ne ŝanĝiĝis. Eĉ ankoraŭ post la eksigo de KPJ el Kominform en novembro 1948 Tito laŭdegis „la sistemon de Sovetunio kiel plej bonan kaj justan sociordon". Forte impresata de la malstabila konduto de la malfacile prikalkulebla ruĝa caro, ankoraŭ antaŭ sia morto Tito ŝajne konfesis, ke li neniam vere komprenis tiun homon. Kia ajn estis la vera sinteno de Tito rilate al Stalin, fakte jam en 1948 Jugoslavio, kiu ŝanceliĝis inter okcidento kaj oriento, estis kondukita en sakstraton, kiun ĝi principe ne plu sukcesis forlasi. Do, la premisoj por la konstruado de ´nova´, socialisma Jugoslavio estis malbonaj. En ĉi tiu historia momento Tito devis senti sin kiel venkinton sed ankaŭ kiel malgajninton.

## La dua perforta ŝtatigo kiel pekokonfeso …

Por ripari la aperintan damaĝon kaj por demonstri, ke oni tute ne celis trompi Stalinon aŭ forlasi la marksismon-leninismon, la jugoslaviaj komunistoj devis montri konkretajn agadojn. Tiel, survoje al la „konstruado de la socialismo kaj komunismo" la jugoslaviaj komunistoj efektivigis la duan perfortan ŝtatigon de la produktejoj kaj servoj en la lando. Tio signifis, ke Jugoslavio praktike tute abolis la privatan posedon. Komence de 1949 sekvis la dua ondo de la konfiskado de la privata posedo, de la punado de malobeemaj civitanoj kaj de la purigado de la lando kaj partio de „kapitalismaj elementoj". Homoj estis arbitre persekutataj, arestitaj, punitaj kaj ruinigitaj, ĉar ili kontraŭstaris la novan kurson aŭ estis suspektataj, ke ili faras tion. Ŝajnas, ke precipe Kroatio suferis sub tia ekstrema malprivatigo. Sed ankaŭ la kamparanoj en Serbio estis senkompate turmentataj. Miloj da kamparanaj entreprenoj estis senposedigitaj. Laŭ la valida leĝo ili devis transdoni ĉion al la ŝtato, kion ili mem produktis. Tito postulis de la kamparanoj kolektiĝi en laborkomunumoj, kiuj similis al sovetiaj kolĥozoj. Dum en 1947 en Jugoslavio ekzistis nur kelkcent tiaj entreprenoj, jarojn poste ekzistis jam kelkaj miloj. Kiu posedis iomete pli ol la malriĉuloj, tiu estis proklamita kiel kulako kaj adekvate traktaka kiel tia. Kiu kaŝis ion, tiu riskis kruelan punon aŭ estis sendita al koncentrejo por la deviga laboro.[16] Ĉi tiu ĝenerala finkalkulado ampleksis pli kaj pli da popolaj tavoloj, kaj precipe la simplaj civitanoj suferis sub tia senjura reĝimo kaj sub la limigo de la libereco. En 1951 en Serbio estis punitaj minumume 100´000 homoj, sole en la ĉirkaŭajo de Belgrado ĝis la mezo de ĉi tiu jaro 86´000 kamparanoj trapasis la malliberejon. Ankaŭ en la kultura sfero la sovetiigo estis rigore akcelata. Nur en 1957 la jugoslaviaj gvidantoj konfesis, ke la perforta kolektivigo estis eraro.

En 1952 en Bosnio eksplodis ribelo, kiu fariĝis konata kiel „Cazinska buna", en kiu la kamparanoj protestis kontraŭ la agrikultura politiko de la partio. La ribelo estis disbatita per tankoj.

Kiel tiu raporto montras, la jugoslavia registaro ĉiel klopodis regajni la konfidon de Stalin. Sed la ofendita Kreml-estro ne plu dankis la flatemajn penojn de la kamaradoj en Belgrado, kiujn li proklamis herezuloj. Male, li venĝis sin kontraŭ la jugoslavoj. Por trankviligi la ĉagrenitan sovetian gvidanton al la jugoslavoj fine ankaŭ ne plu helpis ilia hipokrite ripetata pasia esprimado de la fideleco kaj la elpuŝado de laŭtaj himnaj kantoj, kiujn ili celebradis honore al Stalin dum siaj partiaj kongresoj kaj en la gazetaro. Pri la bizaraj ovacioj je la honoro de Stalin oni rezignis en Jugoslavo nur post lia morto en 1953, dum la stalinisma sistemo kaj ĝia socistrukturo en principo restis konservata fakte ĝis la fino de la komunisma erao en Jugoslavio.

[15] Mallongigo de „Komunisma Informburoo", kiu ekzistis inter 1947 kaj 1956 kiel superŝtata unuiĝo de komunismaj partioj de BG, GDR, F, I, YU (ĝis 1948), PL, R, SU, CS kaj H. Ĝi anstataŭis Kominternon, kiu estis malfondita en 1943.

[16] Kiel Svetozar Vukmanović (-„Tempo") rakontis en sia memuara libro *Mia vojo kun Tito* (germana eld. de 1972, p. 201), en 1949 amaso da jugoslavoj (kamparanoj, senlaboruloj k.a.) estis senditaj al deviga laboro en minejoj, post kiam Sovetunio bojkotis la ekonomion de Jugoslavio kaj la Okcidento „ĉantaĝis" Jugoslavion per diversaj financaj postuloj.

## … kaj la persekutado de Kominform-istoj kaj opoziciuloj

Kiam la titoistoj komprenis, ke ili „povas regadi ankaŭ solaj“, ili komencis persekutadi ĉiujn jugoslaviajn komunistojn, kiuj montriĝis nesufiĉe lojalaj al Tito kaj kiuj estis konsiderataj kiel apogantoj de Kominform. Tiel okazis, ke en la unua duono de la 50aj jaroj 273´000 membroj estis eksigitaj el la partio kaj 123´000 kamaradoj ricevis partian punon. Por malaperigi kaj izoli la kominformistojn, la Tito-reĝimo starigis specialajn labor-koncentrejojn, ne malpli ol 20 en la tuta lando, inter kiuj la insula fortikaĵo de Goli otok („nuda insulo“) en la norda Adriatiko estis la plej fifama kaj plej terura. Laŭ atestoj de prizonanoj mem, tiuj sekretaj koncentrejoj, kaŝitaj kiel „centroj de la sociserva laboro“,[17] estis kompareblaj kun la sovetia gulago aŭ la nazigermanaj koncentrejoj mem. Surloke regis neelteneblaj vivkondiĉoj, kaj oni turmentadis la malliberulojn, kiuj devis porti numeron. En Goli otok estis retenataj ne nur kominformistoj kaj iuj antaŭmilitaj kontraŭuloj de Tito, sed tie troviĝis ankaŭ sennombraj ´meritaj´ jugoslaviaj komunistoj, membroj de la CK kaj politikaj gvidantoj de la serba kaj kroata popoloj. Proksimume 16´000 prizonanoj trapasis la insulon kaj ĉ. 400 eĉ ne plu revenis el tiu loko, kie ili mizere pereis. En la 70aj jaroj Goli otok finfine aperis sur la tagordo de la Internacia Kortumo por militkrimoj, sed la kondamno de Tito povis esti sukcese evitita. La lagro sur Goli otok mem estis fermita nur du jarojn antaŭ la disfalo de la titoisma Jugoslavio.[18]

Kompreneble, tiuj temoj kaj problemoj restis tabuaj en la titoisma Jugoslavio. Eĉ okcidentaj socialistoj kiel Jean-Paul Sartre estis blindigitaj de la YU-propagando kaj fermis la okulojn antaŭ la evidentaj homrajtaj lezadoj en lando, kiu pro laŭdire pli bona socialismo estis internacie tro laŭdata kaj admirata precipe pro tio, ke la jugoslavoj aŭdacis kontraŭstari Sovetunion kaj la Orientan Blokon.

Dum en Jugoslavio miloj da laŭdiraj opoziciuloj malaperis en koncentrejoj kaj malliberejoj, Tito akceptis ampleksan ekonomian kaj armean helpon de la Okcidento, precipe de Usono – la ĉi-koncernaj faktoj kaj ciferoj estis publikigitaj nur post la fino de la komunisma erao. Kvankam kun Churchill Tito flegadis amikajn rilatojn kaj komence eĉ ŝajnis favori la enkondukon de la demokratio, tiu ´degela vetero´ inter komunistoj kaj kontraŭ-komunistoj rapide trovis sian tragikan finon. Kiam Tito rimarkis, ke kelkaj kamaradoj komencis eluzi la demokratiecan etoson por sincere paroli kaj skribi pri diversaj malbonaj tendencoj en la partio, li reagis kolere. Precipe Milovan Đilas, la plej fama jugoslavia disidento, atakis la „karierulojn kaj hipokritulojn“ en la partio, pro kio li estis akre venĝita de Tito. Đilas estis proklamita skizofrenia kaj Tito interpretis lian kritikon, probable ne sen mem suferi paranojon, en tiu senco, ke li riproĉis al Đilas, ke li celis „likvidi“ la Ligon de Komunistoj kaj „disbati la partian disciplinon“. Por tiuj ´fiagoj´ lia plej proksima partia kunlaborinto, al kiu Tito devis multon danki, inter alie la ´genian´ ideon de la laborista memadministrado, kiu plibonigis la ekonomion de Jugoslavio kaj rapide altigis la vinivelon de la jugoslavoj, Tito punigis lin per naŭjara arestado en la malliberejo kaj tiel malhelpis al li reveni en la politikon. Ankaŭ ĉi tiu konflikto montris, ke Tito, kiu estis nomata „la malgranda Stalin“, restis fidela al si kiel stalinisto: li tute ne kapablis pardoni al tiuj, pri kiuj li supozis, ke ili kritikis, trompis aŭ perfidis lin. La opcion de la demokratio kiel politika sistemo por Jugoslavio, kiu elektis la socialismon, Tito ekskludis jam dekomence, ĉar tia sistemo estus permesinta la ekziston kaj konkuradon de pluraj partioj kun diversaj politikaj konceptoj kaj programoj. Ĝuste tia sistemo nature ne povis esti konsiderata de Tito, ĉar ĝi estus estinta, laŭ lia politika kompreno, kontraŭdiro en si mem por la socialisma sistemo, kiu konsideras sin en principo mem demokratia, kvankam ĝi konas nur unusolan politikan partion, koncepton kaj programon. Krom tio, komunistoj kiel Tito kredis, ke demokratio por la kontraŭuloj de la socialismo ĉiukaze ne rajtas ekzisti. La tribunalojn kaj juristojn Tito alvokis, ke ili „ne strikte respektu la leĝojn“, kio montras, ke ankaŭ pri la ´objektiva´ juro li fajfis.

Ekzistas ankoraŭ aliaj ekzemploj de pli malpli famaj komunistoj, kiuj estis senkompate persekutataj kaj punitaj de Tito lige kun la skismo kun Stalin. Tiel, en junio 1948 subite malaperis Andrija Hebrang, kiu estis gvida funkciulo de la kroata KP kaj cetere de juda deveno. Ĉe tiu iama ministro de la registaro de Tito, kiu montris por-kroatan sintenon, aperis duboj ne nur pri lia lojaleco rilate al la jugoslavia naciliberiga movado, sed ekzistis ankaŭ supozoj pri lia kunlaborado kun la nazioj kaj ke li estis spiono de NKVD. Alia viktimo de la paranoja malfidemo de Tito fariĝis en 1952 ankaŭ d-ro Blagoje

---

[17] Al eksterlando eksportitaj ŝtonmaterialoj, produktitaj de la prizonuloj de Goli otok, estis venditaj en la nomo de „Velebit Rijeka Industrial Conglomerate“. (Vd. Josip Zoretić).

[18] La situon de la insulo vd. sub http://www.goli-otok.com/german/golio02a_d.htm. Novajn verkojn pri Goli otok vd. http://www.bukla.si/?action=books&book_id=16047, http://bvbr.bib-bvb.de:8991/exlibris/aleph/a21_1/apache_media/JHB4I7KLHS4FGBG8Y2M86H7FHA57KV.pdf kaj http://hsozkult.geschichte.hu-berlin.de/rezensionen/type=rezbuecher&id=23203&view=pdf.

Nešković, kiu rifuzis la armean kunlaboron kun Usono kaj preferis subteni iun rezolucion favore al la Buroo de Kominform. Sub la premo de Tito en 1970 ankaŭ Svetozar Vukmanović (-„Tempo“) devis forlasi la partion, post kiam li subtenis la ideon de laboristaj strikoj.

Eĉ la edzinoj de Tito, kiujn la jugo-marŝalo kvazaŭ konsideris servistinoj de la partio kaj posedaĵo de la ŝtato, al kiu ili devis esti ´redonitaj´ post plenumita devo, ne estis protektataj kontraŭ arbitra mistraktado. Kiam Tito kredis, ke ili ne plu utilas al li aŭ komencas tedi lin, li distanciĝis de tiuj virinoj. Supozeble ne sen kontribuo de Stalin mem, kiu kutimis krude enmiksiĝi en la privatan vivon de siaj kunlaborantoj kaj konatoj, Tito finkalkulis kun „Lucija Valter“, kiu estis mortpafita en Sovetunio kiel „germana spionino“. Alia edzino de Tito, Pelagija Belousova (1904-60), restadis unu jardekon en stalinismaj prizonoj. En 1952 Tito edziĝis al Jovanka (Budisavljević) por 23 jaroj. En eksterlando ŝi estis admirata kiel unua damo de Jugoslavio, kun kiu flirtis eĉ Ĥruŝĉov. La krizo de la privataj rilatoj inter Tito kaj Jovanka estis neoficiale klarigita per tio, ke la serbino malkontentis pri la maljuniĝanta edzo, kiu fariĝis pli kaj pli malfacile eltenebla partnero. Povas esti, ke Jovanka iĝis viktimo de diversaj intrigoj, en kiuj laŭdire partoprenis ankaŭ Kardelj kaj generalo Ljubičić. Ŝajnas ke la sola granda amo de Tito restis Davorjanka Zdenka Paunović, kiu mortis en 1946 jam 25-jara je la tuberkulozo.

## Krimeco, korupto, malriĉeco, mondisipemo kaj Tito-kulto sen fino

Kvankam oni kredis, ke la socialisma ekonomia faras rapidajn progresojn en Jugoslavio, la ekonomiaj problemoj, precipe la misuzoj kaj la krimeco, draste kreskis, kiel Simić raportas, precipe en suda Serbio. Ĉi tiu problemo verŝajne estis ligita kun la kreskanta korupto kaj precipe kun la malriĉeco de vastaj tavoloj, ĉar en tiu tempo la averaĝa salajro por laboristo en gvida jugoslavia entrepreno estis nur ĉirkaŭ 35 dolaroj. Inter 1956 kaj 1962 258´000 personoj (de entute 470´000 enloĝantoj) estis vokitaj antaŭ la tribunalon, ĉu kiel akuzantoj, akuzitoj, atestantoj aŭ ekspertizistoj. Kun la amasoj de malkontentaj laborfortoj, kiuj intencis fuĝi eksterlanden, nova konflikto estis antaŭprogramita, kiu manifestiĝis en tio, ke dekmiloj da jugoslavoj estis haltigitaj ĉe la landlimo, se ili ne disponis la necesan permeson por forlasi la landon kiel labor-elmigrantoj sed tamen volis forveturi, kaj estis senditaj en la malliberejon. Dum la laboristoj kaj la popolo de Jugoslavio malriĉiĝis kaj la enlanda mono konstante perdis sian valoron pro la galopanta inflacio (kiu estis eterna problemo de Jugoslavio), la kostoj por financi la luksan vivon kaj pompan reprezentadon de la komunisma marŝalo, kiu iel similis al bizaraj uniformuloj kiel la germano Hermann Göring aŭ la sovetiano Kliment Vorošilov, ŝveliĝis. Ankaŭ la multnombraj eksterlandaj vojaĝoj de la jugoslavia ŝtatestro ĉefe al Azio kaj Afriko voris miliardojn da dinaroj aŭ milionojn da dolaroj. La legendiĝintaj mondvojaĝoj de Tito, entreprenataj per sia luksa ŝipo „Galeb“ (mevo), sur kiu Tito restadis 500 tagnoktojn, kaj la malmodestaj elspezoj por ŝtatakceptoj kaj ŝtatdonacoj same kiel la akirado de valoraj ekzotaj bestoj aldone ŝarĝis la ŝtatan kason en malproporcia maniero. Al la kreskanta ŝtata deficito kontribuis ankaŭ la provizioj, komispagoj kaj makleraĵoj, kiuj estis pagendaj al diversaj koruptaj ŝtat- kaj militestroj de la blokneŭtralaj landoj, por sekurigi lukrajn mendojn al Jugoslavio. Kompreneble, publika kontrolado de la elspezado de tiu mono, faciligata de senlima disipa mentaleco, komplete mankis, kaj kritiki ĝin ne eblis, ĉar Tito fariĝis senerara partia papo, kiu evidente konsideris tiujn farojn kaj misuzojn kongruaj kun la validaj leĝoj. Sole en la jaro 1977 en Serbio kaj Kroatio por la reprezentado de la ŝtato estis elspezitaj 974 milionoj da novaj dinaroj. De tiu mono oni estus povinta konstrui dumil novajn loĝejojn, kiel la agentejo Tanjug notis la 2an de oktobro 1978 en depeŝo, kiun ankaŭ Tito ricevis. Jam en 1955 Jugoslavio pagis por la infrastrukturo de la jaĥto, kiun oni disponigis al la etiopia ŝtatestro, 520´869 germanajn markojn. Ĉu Jugoslavio vere sendis al la italaj komunistoj 200´000 dolarojn por kovri iliajn perdojn kaj deficitojn, kiel oni rakontis aŭ supozis, ne estas klare.

## Persekutoj kaj subpremoj, ciniko kaj senrespondeco kiel integraj partoj de la ŝtata moralo

Kiam komence de la 60aj jaroj la jugoslavia ekonomio englitis profundan krizon[19] – Simić klarigas la kaŭzojn kaj efikojn per klaraj vortoj – Tito timis perdi sian potencon. En la jugoslavia gazetaro

[19] Pri la 1960aj jaroj en Jugoslavio ekzistas legindaj kontribuaĵoj en la libro de *Grandits/Sundhaussen (eld.): Jugoslawien in den 1960er Jahren.* Wiesbaden 2013. La analizoj traktas aspektojn, kiuj reflektas ankaŭ ´pozitivajn´ evoluojn en Jugoslavio

komenciĝis diskutoj pri ebla interna malintegriĝo de Jugoslavio, tiel ke Tito maltrankvile pensis pri la estonteco de sia ŝtato. Demandoj pri la farendaĵoj li respondis laŭ la malnova sukcesa stalinisma maniero. Li fortigis la reprezaliojn kontraŭ la popolo (multaj jugoslavoj eĉ ne rimarkis ĝin) kaj proklamis la partian monopolon deviga. La komunistoj devis transpreni la respondecon por ĉio kaj la „diktaturo de la proletaro" ne estis abolita. Senskrupule li asertis, ke la plimulto de la loĝantaro en Jugoslavio pensas kiel li mem. Tiel, oni rezignis pri la merkatekonomiaj reformoj, kvankam en komparo kun la monda ekonomio Jugoslavio ne kapablis konkurenci. La ideon de la malcentrigo oni oficiale forlasis kaj ŝovis la solvadon de la problemoj al la respublikoj. Tito ŝajnis perdi la kontrolon pri la ŝtataj aferoj pli kaj pli. Por limigi ilian influon, intelektuloj (kiel la slovena verkisto Edvard Kocbek kaj la serbaj verkistoj Miloš Crnjanski kaj Dragoslav Miĥailović) estis ĉikanataj kaj ofendataj, se ili ne pretis agnoski la bolŝevisman potencon, partiaj kamaradoj (kiel Ranković) perdis la honoron kaj estis ekskluditaj de la politiko, la historiografio estis falsata kaj la kulto ĉirkaŭ la persono de Tito estis firmigata. Iu asistento en la filozofia fakultato en Zadar, kiu nomiĝis Miĥailo Miĥailov, estis arestita dum naŭ monatoj, ĉar li publikigis negativan raporton pri iu vojaĝo tra Sovetunio. Kiam en 1968 ankaŭ la studentoj de Belgrado komencis protesti kontraŭ la mizera situacio en la lando kaj eĉ postulis la demision de Tito, la ŝtatestro unue reagis kolere sed poste raciiĝis por trankviligi la studentojn kaj elteni ankaŭ tiun ĉi krizon. Ankaŭ kun la albanoj en Kosovo kaj Metoĥio, kiuj vivis en la plej malriĉa kaj subevoluinta provinco de Jugoslavio, Tito estis devigata gvidi afablajn interparolojn por eviti, ke la albanoj bojkotos lin kaj lian sistemon kaj por ŝajnigi, ke ĉio estas en perfekta ordo. Interparoloj kun la gvidantoj de Kosovo estis sekrete kondukataj, ĉar la popolo ne devis ekscii la veron pri la aktuala stato de la aferoj. En 1968 en Kosovo eksplodis protestoj de la albanoj, kiuj estis sufokitaj de la polico. Simila konflikto ripetiĝis en tiu provinco en 1981. La titoismo, kiu estis protektata de la gazetara cenzuro, evidente troviĝis en danĝera krizo de legitimeco, des pli ke en la lando disvastiĝis ciniko, ideologia indiferenteco, senrespondeco, anarkio kaj misuzo de la potenco. Malgraŭ tio, Tito toleris altgrade dubindajn praktikojn kiel la konstruadon de luksaj vilaoj por partiaj funkciuloj, kiuj estis starigitaj de devigitaj laboristoj. Malantaŭ la partiaj kaj armeaj kulisoj okazis viglaj diskutoj, ekzemple pri la ĝusta strategio de la jugoslaviaj generaloj, al kiuj estis riproĉite, ke ili konstruis la sistemon de la ŝtata defendo sur falsaj premisoj. Validis la dogmo, ke la minaco kontraŭ la ŝtato venas nur el Okcidento, dum de la orienta flanko (t.e. Sovetunio kaj Orienta Bloko) danĝero ne ekzistas. Ktp. Tiel oni konstante refalis en malnovan pensadon por protekti Jugoslavion de la disfalo. Kvankam Tito intencis esti prezidento nur dum unu jaro, li konservis ĉi tiun oficon ĝis la vivofino. Post konsultado kun ĉiuj respublikoj Tito konstatis perplekse komence de la 70aj jaroj, ke neniu volas transpreni la prezidon de la federacio.[20] Okcidentaj observantoj nomis la jugoslaviajn instancojn sarkasme „diskutkluboj". Efektive, sur ĉiuj ŝtataj ebenoj kaj en ĉiuj instancoj okazis senfinaj diskutoj kaj debatoj, kiuj ne trafis la celon kaj ĉirkaŭis la esencon.[21] Neniu en tiu ŝtato sentis sin kompetenta aŭ respondeca por io ajn, kaj solvoj estis longe prokrastataj.

## Sufokado de la „Kroata Printempo"…

Dum la ´griza eminentulo´ Kardelj, kiu jam pli frue traktis en sia libro la „nacian demandon de la slovenoj", volis reorganizi la federacian gvidostrukturon de Jugoslavio, la partiaj gvidantoj de Kroatio celis redukti la federacian influon en la respublikoj al minimumo kaj postulis, ke Kroatio povu mem gvidi siajn enlandajn aferojn kaj problemojn. Ĉi tiu politiko ricevis vastan subtenon de la kroatia popolo kaj de la naciisme orientita elito de Kroatio. Tiu evoluo kondukis al la t.n. „Kroata Printempo",[22] kiu eksplodis kelkajn jarojn post la „Praga Printempo" (1968), kiu cetere estis apogata ankaŭ de Tito. Kvankam en 1970 Tito ŝajnis ankoraŭ subteni la kroatan naciismon, li turnis la lancon kiam en 1971 Kroatio postulis la membriĝon en UN. Nun Tito reagis per kutimaj komunismaj metodoj kaj procedis kun la kroatiaj partiestroj same kiel kun Đilas und Ranković. Li anstataŭigis 350 kroatiajn funkciulojn per aliaj, dum ĉirkaŭ 3000 personoj estis eksigitaj el la Ligo de Komunistoj aŭ alimaniere punitaj. La nova ĉefpotenculo

---

dum tiu tempo kiel la liberalismon en la kulturo kaj turismon aŭ la konsumorientismon en la socio. Pri ĉi tiu historia periodo de Jugoslavio verkis ankaŭ *Marie-Janine Calic* en*: Geschichte Jugoslawiens im 20. Jahrhundert.*

[20] Fakte Tito estis prezidento de Jugoslavio de la 14a de januaro 1953 ĝis la 4a de majo 1980, tago de lia morto.

[21] Pri la lingvaj diskutoj en Jugoslavio aperis jena leginda libro de *Ksenija Cvetković-Sander: Sprachpolitik und nationale Identität im sozialistischen Jugoslawien (1945-1991). Serbokroatisch, Albanisch, Makedonisch und Slowenisch.* Harrassowitz 2011. (Vd. http://www.osteuropa.ch/Rezensionen/Rez_Harrassowitz_Cvetkovic_Jugoslawien.pdf).

[22] Simić ne uzas ĉi tiun terminon.

de Kroatio fariĝis Vladimir Bakarić (mort. en 1983), unu el la plej intimaj kaj lojalaj kunlaborantoj de Tito. Kvankam konvinkita jugo-federisto kun multe da komprenemo por la deziroj de la kroataj naciistoj sen esti demokrato, ankaŭ Bakarić ŝajnis fajfi pri ´superfluaj´ diskutoj, precipe se ili estis gvidataj de (junaj) homoj, kiuj ne batalis per pafiloj por la ´libereco´, kiel Bakarić kutimis esprimi sin.

Simić rakontas interesan incidenton, kiu okazis duonjaron post la ŝanĝoj ĉe la pinto de la kroatiaj partiaj gvidantoj: Tiam en okcidenta Bosnio aperis dek naŭ armitaj kroataj elmigrintoj, kiuj volis testi la defendokapaciton de la Tito-ŝtato. Granda nombro de jugoslaviaj armeaj policistoj unue klopodis vane mortigi tiujn enpenetrintajn ribelulojn-atencantojn. Ĉirkaŭ dek tri anoj de la sekureca servo perdis la vivon en tiu ĉi operaco. Ŝajnas, ke finfine oni tamen sukcesis aresti tiujn eksterlandajn „teroristojn". Kvar el ili estis mortkondamnitaj, ĉe tri homoj la mortpuno estis efektivigita kaj la kvara homo estis malliberigita por 20 jaroj. Nur jarojn poste la jugoslavia publiko estis informita pri tiu tragika okazaĵo.

En tiu ĉi kunteksto traktendaj estus ankoraŭ la mortigo de ekzil-kroatoj en Germanio en la 1980aj jaroj, kiu evidente estis organizita de UDBA.[23]

## … kaj la supremado de la serbaj liberaluloj

En la sama jaro de la „Kroata printempo" Tito plendis, ke en Belgrado okazas kampanjo kontraŭ lia persono. Marko Nikezić, kiu tiam estis partiestro en Serbio, postulis interparoladon kun Tito, kiu ankaŭ fakte okazis en la ĉeesto de dek ok gvidaj politikaj personecoj de Serbio. Dum tiu diskuto, kiun Simić nomis la „plej malfacila interparolado en la kariero de Tito", la serbiaj reprezentantoj plendis pri la konstantaj atakoj de Tito kontraŭ ili. Ĉar Tito evidente sentis sin en malforta pozicio, li proponis al la kamaradoj „meti ĉion ad acta". Kompreneble, Tito, kiu estis suspektema kaj venĝema homo, tute ne intencis forgesi la aferon. Dek kvin monatojn post tiu memorinda kunsido li decidis finkalkuli kun la „liberaluloj" de Serbio kaj elŝanĝi la serbiajn gvidantojn. Nikezić, Ilija Rajačić kaj Latinka Perović perdis siajn oficojn. En la sekva partia purigado, kiu direktis sin kontraŭ la liberaliĝo kaj moderniĝo de Serbio, estis forigitaj ĉirkaŭ 6000 personoj el la politikaj, ekonomiaj kaj kulturaj institucioj.Ankaŭ en Vojvodino sennombraj gravaj funkciuloj estis elŝanĝitaj, 700 membroj estis punitaj aŭ eksigitaj el la partio. Kiel Simić plue skribas, la nova serbia registaro nur mokis pri la ideo enkonduki modernajn teknologiojn kaj diskreditis la aktualan gvidmanieron kiel „teknokratiismon", kiun ili celis eviti kaj sufokis en la ĝermoj. En la sekvo la flatado al Tito kaj la ĵurado de la fideleco al lia politiko estis konsiderataj kiel mezuro por la matureco kaj la sukceso de la tiamaj serbiaj politikistoj, kiuj estis politike kaj ideologie egalŝaltataj. Aŭdiencoj ĉe Tito havis la solan funkcion, ke tiuj homoj aŭskultu lian opinion, kiu fariĝis deviga por ĉiuj, por konfirmi ĝin, kaj ke ili kapjesu kaj silentu. Ankaŭ Kardelj kaj Ljubičić kondutis kiel ´pugolekantoj´, kiam ili vizitis la „maljunulon" (stari), kiel Tito estis kutime nomata de la kamaradoj. Ankaŭ pri tiuj okazaĵoj la jugoslavoj eksciis fakte nur kvardek jarojn poste, kiam oni komencis esplori la historion de Jugoslavio.

Sed per la disbatado de la „Kroata Printempo" kaj la forpuŝado de la serbiaj „liberaluloj" en la jaroj 1971/72 la reprezalioj en la ŝtato de Tito ankoraŭ ne finiĝis. Ekzemple la milita tribunalo en Belgrado akuzis iun profesoron de la jura fakultato. Al Miĥajlo Đurić, kiel la viktimo nomiĝis, oni riproĉis, ke dum iu publika diskuto li esprimis kritikan opinion pri la problemoj de la federigo de Jugoslavio. La profesoro perdis sian postenon kaj devis iri por du jaroj en la malliberejon. Krom tio, pluraj okcidentaj gazetoj kiel *Financial Times, Daily Telegraph, Kleine Zeitung, Die Weltwoche* kaj *Corriere della Sera* estis malpermesataj en Jugoslavio. En 1971 648 personoj estis akuzitaj pro parolaj deliktoj „kontraŭ la popolo kaj la ŝtato". Unu jaron poste pro tio jam 1881 personoj estis akuzitaj. La 8an de oktobro 1972 la zagreba gazeto *Vjesnik* publikigis detalan pravigon de Tito, kiu verkis pri la problemo de la „klasa malamiko". En majo 1974 Tito, kiu fariĝis *dumviva* prezidento, klarigis triumfante, ke „ĉiuj kontraŭuloj" estas venkitaj.

## Perdita sento de la realismo

Sed Tito travivis ankaŭ malsukcesojn. Kompletan malvenkon li devis elteni, kiam la propono nomumi lin kandidato por la nobelpremio pri paco fiaskis. Nek Willy Brandt nek Indira Gandhi nek Haile Selassie

[23] Aktualan filmon (okt. 2014) pri ĉi tiu temo vd. sub http://www.ardmediathek.de/tv/Reportage-Dokumentation/Mord-in-Titos-Namen-Geheime-Killerkomm/Das-Erste/Video?documentId=23812596&bcastId=799280.

nek U Thant nek Urho Kekkonen nek Habib Bourguiba nek Naum Goldmann, la prezidanto de la Juda Mondkongreso, nek la ortodoksa kaj romkatolika eklezioj en Jugoslavio subtenis la proponon. Finfine mankis unusola voĉo, sed ĉi tiu sufiĉis por ne ricevi la premion aljuĝita. Anstataŭ la dezirata nobelpremio pri paco, Tito ricevis alian premion, kiun Nehru sugestis. Nu, Tito jam estis triobla nacia heroo de Jugoslavio, portanto de miloj da honorinsignoj, aljuĝitaj de 59 ŝtatoj al li; krom tio li estis honordoktoro de la (sufiĉe sensignifaj) universitatoj de Ranguno, Bandungo, Santiago, Alĝero, Halifakso, Varsovio, Adis-Abebo kaj Ulan-Batoro.

Kiel forte Tito malproksimiĝis de la realeco (aŭ realismo), montris ankaŭ lia entuziasma komento, kiam li revenis de vojaĝo al Norda Koreio. Ŝajnas ke la fera disciplino en la horora regno de Kim Il Sung (Kim Ir Sen) impresis lin, tiel ke li provis kompreni kaj klarigi la rigoran diktaturon kaj la ĝeneralan adoradon de la diktatoro per la „specifa tradicio de la korea popolo“. Tito relative ofte vizitis Rumanion, kiu estis regata de ne malpli groteska komunisma diktatoro, nome Ceauşescu, kiun Tito iam nomis „pugolekanto“. Kurt Waldheim, la prezidento de Aŭstrio, kiu poste perdis sian honoron lige kun la skandalo pri sia kunrespondeco por militkrimoj en Balkanio, ricevis altan jugoslavian ordenon. En tiu kazo ŝajnas, ke Tito simple estis trompita de la farisea aŭstra ŝtatestro, kiu prisilentis en sia biografio sian rolon en la milito en Jugoslavio, kie li batalis kiel membro de germana taĉmento kontraŭ la partizanoj de Tito![24]

## En kazo de dubo por la socialismo kaj kontraŭ la Okcidento, malgraŭ ekonomia mizero

En la plej lastaj jaroj de sia vivo Tito pli kaj pli ofte pensis pri la estonteco de Jugoslavio. Sed li kredis sin sekura: La pluekzistadon de Jugoslavio devis garantii la Ligo de Komunistoj de Jugoslavio kaj la jugoslavia armeo (kiu estis konsiderata kiel plej forta armeo en Eŭropo ekster SU), la du ĉefaj pilieroj aŭ kolonoj de la jugoslavia ŝtatpotenco. En kazo de konflikto inter Oriento kaj Okcidento Tito vidis sin ĉiukaze sur la flanko de la socialismo. Por iom forgesi siajn zorgojn pri la estonteco Tito kredis, ke Jugoslavio estas la plej stabila kaj plej firma ŝtato de Eŭropo. Tion diris al li la ĉinoj. „Nia ŝtato iras en la direkto de granda estonteco“, li diris en majo 1978 sur Brioni. Ke multaj kialoj ekzistis por esti optimisma, li konfirmis okaze de la Dekunua Kongreso de LdKJ. Laŭ li la „nacia demando“ estis solvita en Jugoslavio kaj la „naciismaj ekscesoj“, kiuj laŭ li tamen ekzistis en Jugoslavio, estis „bagateloj“. Tito konsideris sian verkon unika modela kazo, pri kiu li fieris kaj kiu estis adorata kaj respektata de la tuta mondo. Ĉie en Jugoslavio, kie Tito aperis, li estis pompe akceptata kaj festata. Tio havigis al li la iluzion, ke la popolo konsentas kaj kontentas pri liaj gvidamaniero kaj politiko. Sed precipe la ekonomia stato de Jugoslavio estis ĉirkaŭ 1977 malproksima de stabileco kaj firmeco.

Ĝuste la ekonomia krizo akriĝis de jaro al jaro: En la 70aj jaroj la socia produkto perdis ĉiujare 8 procentojn pli ol ĝi kreis. Kun averaĝa procentaĵo de 17,7 la inflacio estis la plej alta en Eŭropo. Ĉiujare la ŝuldoj kreskis je 25% kaj la produktiveco malkreskis je 2%. En komparo kun la pli efika Okcidento la maniero de la produktado en Jugoslavio estis karakterizata de pli kaj pli malraciaj formoj. La jugoslavia eksporto eĉ ne kovris la duonon de la importo. Nur por pagi interezojn al eksterlando devis esti uzataj 10 miliardoj da dolaroj. En 1979 la nombro de la senlaboruloj en Jugoslavio sumigis 800´000 personojn. La sama kvanto de jugoslavoj laboris en eksterlando kiel t.n. gastlaboristoj, kaj 1,8 milionoj da homoj laboris en Jugoslavio nur laŭŝajne (ciferoj de Simić). La vivkvalito de la jugoslavoj falis je pli ol triono. La 5-jaraj ekonomiaj planoj estis apenaŭ efektivigitaj. El ekonomia vidpunkto Jugoslavio postrestis eĉ malantaŭ ŝtatoj de la Sovetia aŭ Orienta Bloko, kaj la konkurenc-kapablo de Jugoslavio falis al la nulpunkto. La nivelo de la jugoslavia ekonomio refariĝis tia, kia ĝi estis antaŭ la tempo de la skismo kun Stalin. Senkonsidere al ĉiuj negativaj indikoj Tito firme kredis, ke li estas „sur la ĝusta vojo“. Kaj malgraŭ la ĝenerala mizero la jugo-propagando asertis, ke la homoj en Jugoslavio vivas pli bone ol en Usono. En sia plej lasta publika parolado Tito vidis la kaŭzojn por „ĉiuj tiuj seriozaj problemoj“ ne en la sistemo mem sed en ĝia nesufiĉa utiligado.

Post la morto de Tito, kiu okazis la 4an de majo 1980 en Ljubljana post grava malsano, Tito plu vivis en la imagoj de la homoj. Kun la slogano „Ankaŭ post Tito – Tito!“ lia nomo, kiu fariĝis la mezuro por ĉiuj aferoj, estis leĝe protektita. Por la plej malgranda provo de Tito-reviziismo oni povis ricevi rigorajn punojn. Tiel ekzemple okazis, ke iu civitano estis sendita al psikiatra kliniko por ok jaroj pro tio,

[24] La jugoslaviajn-aŭstriajn rilatojn Simić traktas en aparta aldona ĉapitro, same la rilatojn inter Jugoslavio kaj Germanio.

ke li diris, ke ankaŭ Tito ne estas senerara. En simila kazo iu serba kolonelo estis sendita por 15 jaroj en la malliberejon.


En 1991 la titoisma Jugoslavio, kiu estis ekonomie ruinigita, ĉesis ekzisti kaj dronis en sanga interetna milito, kiun lanĉis serboj, kroatoj kaj bosniaj muzulmanoj. El tiu milito la unuopaj respublikoj de Jugoslavio eliris kiel memstaraj, sendependaj ŝtatoj. Eĉ Kosovo kaj Montenegro profitis la okazon kaj forlasis la unuiĝon kun Serbio post gravaj militaj konfliktoj, dum kiuj nekonata nombro de civiluloj kaj soldatoj perdis sian vivon aŭ estis vunditaj aŭ lezitaj.[25]

## Ambivalenta fina bilanco

Kiel atendeble, la bilanco de Simić pri Tito estas do ambivalenta, ĉar ĝi povas esti nur ambivalenta. Nu, Tito efektivigis en principo ĉion, kion li volis realigi, kaj persone li ricevis ĉion, kio estis ebla ricevi, kiel la aŭtoro skribas en sia konkludo. Sed al sia popolo li povis doni nek liberecon, nek demokratecon, nek ekonomian prosperon. Tito estis freneze amata kaj adorata de la popoloj de Jugoslavio kvazaŭ kiel dio. La sekreton de tiu enigmo aŭ paradokso Simić vidas malpli en la politika kapablo de Tito sed multe pli en la manipulebla mentaleco de la balkanaj popoloj kaj en tio, ke post la dua mondmilito la popoloj de Jugoslavio strebis ĉiurimede liberigi sin de la katenoj de sia malfeliĉa pasinteco kaj konstrui novan, pli bonan estontecon. Nur Tito kaj liaj komunistoj povis promesi tion. Tito, kiu sukcesis ĝustatempe forpuŝi siajn kontraŭulojn kaj konkurentojn, okupiĝis pli multe pri ideologio anstataŭ pri ekonomio, pri kiu li malmulte komprenis, kaj li zorgis pli multe pri sia persona gloro ol pri la longdaŭra prosperado de la lando kaj socio de Jugoslavio. La reformoj, kiujn Tito faris aŭ volis fari, stagnis en siaj komencoj kaj pli similis al simulado de reformoj ol al veraj reformoj. La tipe jugoslaviaj socialismo, memadministrata ekonomio, federismo kaj blokneŭtraleco vekis la iluzion ĉe milionoj, ke ili povas mem decidi pri sia sorto kaj vivi pli bone ol la aliaj. Tiel, Jugoslavio fariĝis ekzercejo por senĉesaj eksperimentoj. Jugoslavio eĉ ne fariĝis alternativa projekto inter socialismo kaj kapitalismo sed servis antaŭ ĉio kiel ideologia spaco al la ambicioj de unusola persono, Tito, por ke li povu sekurigi kaj kontentigi sian potencavidon kaj ludi apartan rolon en la historio. Tito, kiu regadis la landon kiel klasika diktatoro, ne posedis real(ism)an ideon pri la konstruado de taŭga ŝtata projekto, kiu havus longdaŭrajn perspektivojn. Se tia ideo kaj tia projekto estus ekzistintaj, Tito estus ariginta ĉirkaŭ si taŭgajn homojn, kiuj estus apogintaj la efektivigon de tiuj ideoj kaj projekto per siaj kapabloj. Sed ĉirkaŭ Tito ariĝis ĉefe homoj, kiuj kapablis obei, flati, adori, kapjesi, aplaŭdi. Laŭ Simić, Jugoslavio ne vere estis ŝtata ideo sed nur geografia nocio. Dum siaj 35 jaroj de daŭra regado Tito apenaŭ faris ion efikan kaj utilan por venki la historiajn kontraŭdirojn inter serboj kaj kroatoj, sed male li nur instigis kaj vekis iliajn antagonismojn kaj malkonsentojn kun la celo montri al ili kiu estas la mastro de la domo kaj ke ili ne povus ekzisti sen li. Tiel, Tito mem preparis la disfalon de sia ŝtato. Ĝis sia morto Tito sukcesis kaŝi antaŭ la okuloj de la propraj civitanoj kaj de la internacia publiko siajn krimojn, kiujn li organizis kontraŭ siaj partiaj kamaradoj sed ankau kontraŭ serboj, kroatoj, slovenoj, germanoj, jugoslavianoj, opoziciuloj kaj politikaj kontraŭuloj. Kio ne kongruis kun la mitologio, kiun li kreis ĉirkaŭ si, tio estis radikale evitata, forpuŝata kaj subpremata. La amasa mono, kiun Tito ricevis de la usonanoj kaj de la aliancanoj de Jugoslavio, ne vere povis utili al la ekonomio. La mono de la ŝtato estis malavare disipata ĉefe por reprezentaj, ceremoniaj kaj propagandaj celoj sed ne vere investita en prioritatajn projektojn. Stalin helpis al Tito akapari la povon en Jugoslavio, sed post la morto de Stalin lia lando estis subtenata de la okcidentaj aliancanoj, ĉefe usonanoj, germanoj kaj japanoj, kiuj ĉiurimede tenis lin ĉe la potenco, kontraŭ la Orienta Bloko, malgraŭ lezado de la homaj rajtoj kaj arbitra jura aplikado en la propra domo. Simić finas sian studon pri Tito kun jena karakterizo, kiu klare esprimas tiun ambivalentecon de Tito: „La historio memoros pri Tito kiel granda politikisto sed ankaŭ kiel sensukcesa ŝtatestro, kies ŝtato disfalis nur kelkajn jarojn post 35-jara eksperimentado per ĝia konstitucia ordo. Sed ĝi memoros lin ankaŭ kiel orgojlan reganton, kiu ne kapablis scii kiam la tempo alvenis por diri ´estas sufiĉe´ kaj por abdiki.“

© Originale verkita en Esperanto de Andreas Künzli, Svislando, publikigita en julio 2015 sur www.planlingvoj.ch.

[25] Pri la genezo, evoluo kaj rezultoj de tiu milito vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Jugoslawienkriege.




Marc Halder
**La Tito-kulto**
**Karisma regado en la socialisma Jugoslavio**
Oldenburg Wissenschaftsverlag 2013
227 p.
ISBN: 3-486-72289-1
49,80 Eur[D] / 70,20 CHF

# La kulto ĉirkaŭ Tito kuntenis Jugoslavion kaj kostis miliardojn

**Ideologia amasmobilizado de la popolo kiel rimedo por konservi la politikan povon**

Per la forpaso de Josip Broz Tito en la jaro 1980 la mondo ´perdis´ unu el la plej lastaj esceptokazaj politikaj figuroj de la 20a jarcento, kiu ne nur sukcesis venki siajn historiajn malamikojn (faŝistojn kaj nacisocialistojn) kaj flegadi bonajn rilatojn kun la okcidentaj aliancanoj, sed kiu ankaŭ kuraĝis kontraŭstari Sovetunion kaj poziciigi sian landon ekster la blokoj. Almenaŭ en Eŭropo tiun arton sukcesis praktiki verdire nur Tito, la komunisma ĉefgvidanto de Jugoslavio. Malgraŭ ĉiuj pozitivaj konotacioj, kiuj estis ligitaj kun tiu unika personeco, finfine ankaŭ ĉe tiu ŝtatestro ripetiĝis la tipaj trajtoj, kondutmanieroj kaj eraroj, kiujn oni povis observi jam ĉe Hitler kaj Stalin kaj ĉe aliaj similaj gvidantoj de landoj kun diktatura reĝimo: Regemo, kultemo, rigideco, obstineco, dogmismo, maltoleremo, malfido, brutaleco, murdemo, orgojlo, venĝemo, ĵaluzo, ruzeco, egoismo, posedemo, luksemo, malŝparemo misuzemo, disipemo, ekspluatemo, ciniko, indiferenteco, malkompetenteco, senrespondeco. Tiuj kondutformoj verŝajne inkluzivas paranojon kaj skizofrenion, realecfremdecon kaj megalomanion, kvar psikaj statoj, kiuj perfekte kompletigas unu la alian. Malgraŭ la skismo kun Stalin kaj la distanciĝo de la Sovetia aŭ Orienta Bloko, evento kiu estis konsiderata kiel heroaĵo kun jarcenta signifo, Tito restis en si mem dumvive ĝisosta stalinisto. Sed la jugoslavia ´duce´ sukcesis prezenti sin kiel ´pozitivan´ alternativon kaj tiel mondvaste trovis simpation, respekton, agnoskon kaj admiron. Malgraŭ la sennombraj krimoj, por kiuj li respondecis, pri kiuj oni ne parolis dum lia vivotempo kaj kiuj fariĝis publikaj kaj evidentaj nur post lia morto kaj post la kolapso de lia ŝtato.

Marc Halder (nask. Živojinović), historiisto de serba deveno en Kolonjo, taskis sin ellabori la esencajn faktorojn, kriteriojn kaj historiajn konstelaciojn, kiuj difinis kaj cementis la kulton ĉirkaŭ la persono de Tito kaj kiuj aperigis lin kiel grandparte nekontesteblan karisman ĉeffiguron de sia lando. Krom tio, la aŭtoro klarigas la fonon, kiu kondukis al la disfalo kaj finfine pereo de tiu multetna sudorienteŭropa ŝtato, kiam la mito de Tito elvaporiĝis kaj la komunisma sistemo neeviteble kolapsis kelkajn jarojn post lia morto.

La kondiĉojn kaj teoriajn konceptojn, kiuj ludis la decidan rolon por la starigo de kultoj ĉirkaŭ certaj politikaj gvidantoj, Halder mencias en la enkonduka ĉapitro de sia libro. Por klarigi la karismon de certa homo la aŭtoro utiligas la teorion de Max Weber pri karismo, kiun li formulis en sia verkaĵo pri „ekonomio kaj socio“ (en 1922). Dum antikvaj aŭtoroj perceptis la nocion de la karismo en religia senco unuavice kiel esprimon de la dia graco, Weber forĝis sian „karismatismon“ kiel modernan sociologian terminon, per kiu li provis klarigi la esencon de la politika regado. La teorio de Weber priskribas la rilaton inter iu konkreta portanto de karismo (reganto) kaj liaj lojalaj adeptoj (popolo), kiuj adoras tiun karismulon. Tiu rilato kaj la karismo mem ekzistas tiel longe kiel la adeptoj pretas adori, sekvi kaj obei tiun karismulon kaj kredas je lia aŭtoritateco. Do, la karismulo dependas de tiuj adeptoj, de ilia preteco serioze konsideri kaj akcepti lin kiel karismulon kaj de la daŭro de tiu preteco. La aŭtoritateco de la karismulo baziĝas sur certaj specifaj trajtoj de lia personeco kaj sur (la konscio pri) liaj eksterordinaraj

agadoj kaj atingoj kadre de unikaj historiaj eventoj, procezoj kaj cirkonstancoj. La rilato inter la karismulo kaj liaj adeptoj, kiuj havas en principo samajn celojn kaj identajn viziojn kiel la karismulo mem, estas ĉefe emocia, malpli racia. La karismulo devas esti ne nur senescepte agnoskata sed ankaŭ „senlime *amata*“ *de ĉiuj*. Krom tio, la karismulo devas funkcii kiel speco de savanto, kiu promesas al siaj adeptoj la saviĝon en religia-eskatologia senco, kompareble kun Jesuo Kristo por la eklezio, Karlo Markso por la komunismo aŭ L.L. Zamenhof por la universala lingvo.

Ĉu la teorioj de Weber, Cassirer kaj Eliade, al kiuj Halder referencas, taŭgas por analizi la kazon de Tito, do ĉu ili havas iun signifon, sencon, valoron aŭ utilon, mi ne scias. Laŭ mi estus pli utile kompari la karismon de Tito kun la regadokultoj ĉe aliaj komunismaj kaj nekomunismaj karismuloj de lia epoko, ekzemple ĉe Salazar, Franco, Mussolini, Pavelić, Antonescu, Horthy, Piłsudski, Smetona, Ulmanis kaj Päts, Gomułka, Kádár, Ceauşescu, Enver Hoxha aŭ Ĵivkov, aŭ en la kazo de eĉ pli ´fascinaj´ kaj teruraj diktatoroj de Ekstereŭropo kiel Mao Zedong, Gaddafi, Idi Amin, Fidel Castro, Pinochet, Duvalier, Reza Paĥlavi, Ĥomejni, Saddam Hussein, Kim Ir Sen aŭ Pol Pot, kiuj formis la kulminon de fifamaj kaj kontestataj karismaj gvidantoj, pri la diktatoroj en aliaj arabaj kaj islamaj landoj ni tute ne parolu. Tiuj kazoj estas traktataj en la koncerna fakliteraturo pri totalismo, faŝismo kaj komunismo. En la kazo de Tito estas grave emfazi, ke frue li celis ludi la ekskluzivan gvidan rolon inter la jugoslaviaj komunistoj; precipe en la lernejoj de Stalin, Komintern kaj NKVD li lernis kaj profitis la stalinisman metion de la forpuŝado kaj eliminado de rivaloj kaj kontraŭuloj. En tiu senco Tito fariĝis kvazaŭ aŭtentika kopio de Stalin. Certe, Stalin, Dimitrov kaj aliaj gvidaj komunistoj en Moskvo frue rimarkis la valoron kaj utilon de la karisma kamarado el Jugoslavio por adekvate aprezi, respekti, uzi kaj eble ankaŭ timi lin.[26] Kvankam Tito profiliĝis kiel gvidanto jam en pli fruaj jaroj, Halder vidas la komencon de lia karismo tamen nur en la militaj jaroj, pli precize en printempo 1942, kiam dum la jugoslavia partizana milito Tito akiris la statuson de karisma gvidanto, kiam liaj partizanaj kunbatalantoj kaj poste ankaŭ la popolo mem komencis akcepti kaj adori lin kiel specialan kaj ĉefan karisman figuron.

## Titoisma mitologio

En la kazo de Jugoslavio, kies historio konsistis kvazaŭ nur el mitoj kaj legendoj, tia figuro kiel Tito dekomence ludis la centran rolon por la formado de la (nova) identeco. Kiel Halder ĝuste premisas, en la mitologio pri la fondo de la komunisma Jugoslavio la partizana batalo havis elstaran signifon. La resto aperis kvazaŭ de si mem. Kvankam la partizanoj de Tito faris sennombrajn kaj ĝenerale malmulte konatajn militkrimojn ĉe la internaj kontraŭuloj kaj etnaj minoritatoj (precipe jugoslaviaj germanoj), kiuj en Jugoslavio estis ne nur prisilentataj kaj tabuataj sed ankaŭ neniam punitaj, estas klare, ke mensogoj de tiuj speco kaj dimensio ne povis daŭri kaj validi eterne. En Jugoslavio la mitoj estis ĉiam denove adaptataj al la nova politika kaj ekonomia situacioj de la lando, kaj malnovaj mitoj estis kovrataj de novaj. Fakte, ili konserviĝis nemortigeble ĝis hodiaŭ kaj spertas 30 jarojn post la morto de Tito kuriozan reviviĝon praktike en ĉiuj postjugoslaviaj respublikoj, inkluzive Slovenion kaj Kosovon. Nature, la marksismo-leninismo treege taŭgis kiel ideologia gluo por transporti konkretan eskatologian mesaĝ(ar)on kun kvazaŭ-religia funkciado. Per tia ideologia ilaro la mitigo de Tito kaj de la titoismo povis esti firmigata, kaj la aktivecoj kaj ritualoj ligataj kun ĝi ricevis institucian formon. La fakton, ke tiu promeso de la ŝajna saviĝo praktike finiĝis por multaj jugoslavoj per la lezado de la bazaj homaj rajtoj, por iuj eĉ en la malliberejo aŭ per la mortpuno, oni malatentis kaj ignoris. La disponeblaj amaskomunikiloj (precipe gazetoj, radio kaj televido), kiuj estis krude manipulataj ankaŭ en Jugoslavio por propagandaj celoj, estis utiligataj kiel fortigilo de la karismo de Tito, dum la objektiva informado estis malhelpata. En la kazo de la titoisma Jugoslavio do temis pri giganta, manie kaj ruze enscenigita diktaturo, kiu trompis la amasojn, kiuj evidente apenaŭ rimarkis tiun trompon, kun fatalaj sekvoj.

La analizon de la karismo kaj de la persona kulto de Tito Halder faris en kvar kronologie grupigitaj partoj, kiuj entenas jenajn ĉapitrojn: genezo de la persona kulto ĉe Tito, persona kulto dum la regada fazo, postkarisma fazo, kaj kvare, fazo de la restkarismo kaj stigmatizado aŭ nostalgia fazo, post la morto de Tito kaj la kolapso de Jugoslavio.

[26] Pri la stalinisma karaktero de Tito vd. Pero Simić, Tito – sekreto de la jarcento. Ljubljana 2011.

## Komenco de la Tito-kulto dum la partizana milito

Kiel menciite, antaŭ la dua mondmilito Tito ankoraŭ ne disponis publikan karismon. Al la elformiĝonta karismo (kaj mitologio) de Tito kontribuis kelkaj biografiaj cirkonstancoj, kiu estas tamen ne sen intereso: Filo de kroato kaj de slovenino, laboristo el Kumrovec, partopreno en la unua mondmilito flanke de Aŭstrujo-Hungarujo (kontraŭ Serbio!), efektivigado de konspiraj kaj verŝajne ankaŭ kontraŭleĝaj kaj krimaj agadoj en la 20aj jaroj,[27] multjara arestado en malliberejo, ktp. En la 30aj jaroj Josip Broz restadis en Sovetunio, kie li akiris la pseŭdonimon „Tito“[28] kaj renkontis la vivantan Stalinon, kies purigan teroron Tito postvivis sen persona damaĝo sed koste de aliaj partiaj kamaradoj. Multaj aferoj, kiuj okazis en tiu periodo, kaŝiĝas en la malhelo.[29] Kun la stalinismaj instruoj, instrumentoj kaj spertoj, kiujn Tito ricevis en Moskvo, li revenis al Jugoslavio por profiliĝi en la partizana milito kaj kiel komunisma gvidanto kaj milita heroo kontraŭ la „aksaj“ potencoj[30] (ekzemple ĉe la „miraklo“ de Drvaro, kie Tito eskapis sian arestadon fare de la germanoj). Sed en Jugoslavio la glorado de Stalin kaj de Sovetunio ankoraŭ daŭris. Nur en printempo 1942, kiam aperis la unuaj poemoj kaj kantoj honore al la jugoslavia komunisma gvidanto, komenciĝis la persona kulto ĉirkaŭ Tito, kiu estis konscie kaj ĉiam pli kaj pli intense praktikata de la jugoslavoj. Okaze de la dua legendeca plenkunsido de la „Antifaŝisma Konsilio de la Nacia Liberigo de Jugoslavio“ (AVNOJ) de novembro 1943 en Jajce, kiu metis la fundamenton por la estonta politika ordo de Jugoslavio, busto de Tito estis starigita en la konferencejo, kaj li mem estis eknomata marŝalo kaj konfirmita de la kolektivo kiel „genia“ gvidanto, kio havigis al li personan karismon. Per tio, la jugoslavoj ricevis sian propran Stalinon, kiu devis esti same adorata per laŭtaj ovacioj kaj al kiu oni devis ĵuri siajn fidelecon kaj lojalecon. Sed tiu ´genia´ gvidanto ne povis eviti, ke en la dummilitaj bataloj pereis ĉirkaŭ 300´000 partizanoj, kio probable estis tro alta ´sanga´ prezo por la libereco (laŭ iuj kalkuloj mortis ĉirkaŭ 9000 komunistoj aŭ KPJ-membroj, kiuj devis esti anstataŭigitaj post la milito per novaj membroj). Pri ĉi tiu tragedio en Jugoslavio praktike neniu parolis, ĉar tiu diskuto estis subpremata kaj la temo estis tabua. Kun Stalin, kiu dekomence evidentiĝis kiel ekstreme malfacila kaj treege kaprica partnero,[31] jam dum la milito okazis kelkaj „miskomprenoj“, kiuj kondukis al diversaj kvereloj kaj ĝenis la rilatojn inter ambaŭ flankoj. Kompreninte kiuj gigantaj krimoj estis farataj en la nomo de la socialismo en Sovetunio, la jugoslaviaj komunistoj ŝajne emis distanciĝi de Stalin kaj de Sovetunio (kvankam tio evidente ne estis la ĉefa kaŭzo de la skismo). Malgraŭ komenca skeptiko, post la konferenco de Teherano en decembro 1943 ankaŭ la sinteno de la okcidentaj aliancanoj ŝanĝiĝis rilate al Tito; de kontraŭ-komunisma pozicio ĝi metamorfiziĝis al ´mirakla´ internacia agnosko de la komunisma jugoslavia gvidanto, kio logike kaŭzis novajn konfliktojn kun Moskvo.

Post la milito la karismo de Tito, kiu komencis efiki kiel katalizilo de la rekonstrua eŭforio, povis esti utiligata por la propagandaj intencoj kaj celoj de la komunisma reĝimo, ĉar precipe ĉe la pli juna generacio de civitanoj ĝi falis sur fekundan grundon. Nature, la Tito-kulto ludis esencan rolon ankaŭ kiel stabiliga faktoro por la firmigo de la partia regado, kiu inkluzivis la diskreditadon kaj subpremadon de la ideologiaj kaj politikaj kontraŭuloj. Al la Tito-kulto apartenis brue organizataj amasaj manifestacioj de la popolo, dum kiuj la loĝantoj devis regule esprimi sian dankemon pro la venko de la komunistoj super la faŝismo. Kiel la 1a de majo, tiel ankaŭ la (nova) naskiĝtago de Tito, kiu okazis la 25an de majo,[32] estis taŭgaj momentoj, en kiuj la Tito-kulto atingis sian kulminon; ĉi tiuj datrevenoj estis utiligataj por festi kaj konfirmi la lojalecon kaj la „amon kaj fidelecon“ de la laboranta (aŭ laborista) klaso al sia popola heroo. En tiuj tagoj la memelektita marŝalo, kiu aperis ankaŭ kiel ĉefministro de Jugoslavio, rutine ricevadis la plej altajn ordenojn, kiujn la ŝtato disdonis al meritaj civitanoj.[33] Tito estis vidata kvazaŭ sur egala nivelo kun la patrujo kaj inverse, li estis kvazaŭ la sinonimo de Jugoslavio entute. La adoraj kaj

---

[27] Nu, la komunisma partio tiam estis klasifikata de la jugoslavia polico kiel „terorisma“ kaj ĝiaj agadoj aŭtomate kiel kontraŭleĝaj kaj krimaj. Ŝajnas, ke Tio tiam agadis ĉefe kiel partia propagandisto kaj organizanto.

[28] Kiel modelo por tiu pseŭdonimo sendube servis la pseŭdonimoj „Lenin“, „Stalin“ aŭ „Trockij“. Ŝajnas, ke „ti“ signifas „ci“ kaj „to“ signifas „tiu“ aŭ simile.

[29] Pero Simić, kiu ellaboris la restadon de Tito en la 30aj jaroj en Moskvo, venis al la konkludo, ke Tito aktive subtenis la teroron kontraŭ la jugoslaviaj komunistoj, por savi sian propran haŭton kaj fari karieron.

[30] Temas pri la milita akso Berlino-Romo-Tokio.

[31] Vd. M. Đilas: *Interparoloj kun Stalin.* Zürich 1962.

[32] Pri la dato de la preciza naskiĝtago de Tito ekzistas malklareco; fakte cirkulas plej diversaj datoj. Pli novaj sciencaj esploroj baziĝas je la 7a de majo 1892. La 25a de majo kongruas kun la tago, en kiu Tito postvivis en iu batalo dum la partizana milito (konata kiel „miraklo“ de Drvar). (Halder, p. 41).

[33] Tito ricevis entute 106 ordenojn de 61 ŝtatoj (Halder, p. 229).

ovaciaj ritualoj estis kompareblaj kun la tradicioj en la stalinisma Sovetunio kaj en aliaj ŝtatoj de orienta Eŭropo kaj Azio, kiuj fariĝis komunismaj post la milito. Eĉ unu el la asteroidoj, kiuj estis malkovritaj de iu jugoslavia stel-observejo, ricevis la nomon de Tito, same kiel multaj stratoj, placoj kaj urboj: tiel, la ĉefurbo de Montenegro eknomiĝis Titograd anstataŭ Podgorica, kaj tipaj urbonomoj estis Titov Veles, Titova Mitrovica, Titovo Užice, ktp. Precipe Serbio kaj Montenegro transformiĝis en fanatikajn Tito-bastionojn, dum la islama Bosnio kaj la katolika Kroatio dekomence havis gravajn konfliktojn kun la socialisma ideologio, precipe ties ateismo.[34] Do, ne estas hazardo, ke pro propagandaj celoj antaŭ ĉio la postrestinta kaj multkultura Bosnio estis rigore politika egalŝaltata. Tiu emocia ligo, kiu estis artefarite konstruata inter la popolo kaj la gvidanto, devis havi longdaŭran efikon kaj sekurigi la potencon de la komunistoj en estonteco.

## Jugoslavio sen Stalin kaj persekutado de kontraŭuloj kaj opoziciuloj

Halder konsentas pri la pritakso de diversaj aŭtoroj de jugoslavia deveno, ke la Tito-kulto ankoraŭ pli forte prosperis post la soveti-jugoslavia skismo kaj kiam la krizo atingis novan kulminon per la ekskludo de KPJ el la Kominform-Buroo en 1948. La karismo de Tito estis konfirmita en tiu krizo, kiu laŭ Kardelj estis „batalo aŭ por la vivo aŭ la morto“ kaj kiu ricevis novan energion dank´al la mitigita aŭreolo de la nacia „savanto“. La erao sen Stalin do fariĝis dua fonda mito de la komunisma Jugoslavio, kiu estis proklamita la 29an de novembro 1945 kiel „Jugoslavia Federacia Popola Respubliko“. La plimulto de la jugoslaviaj komunistoj kaj de la jugoslavia loĝantaro konsentis subteni Titon en la lukto kontraŭ la sovetia diktatoro. Samtempe, la jugoslavoj ankoraŭ ne rezignis pri la publika glorado de Stalin, malgraŭ ilia aroganta traktado fare de Sovetunio. Male, la adorado de Stalin estis daŭre praktikata laŭ sufiĉe bizara maniero (kiel ekzemple dum la Va kongreso de KPJ en julio 1948). Sed plej malfrue post la morto de la sovetia diktatoro en marto 1953 ĉi tiu neceso farigis superflua.

Laŭ jugoslavia kompreno, la nomado de publikaj lokoj Tito staris en la kulthierarkio plej supre, fakte super Stalin. Tio signifis, ke nur Tito rajtis kiel sola vivanta homo en la jugoslavia toponomio esti nom-dona. En ĉiu ŝtata oficejo kaj en ĉiu lernej-ĉambro devis pendi bildo de Tito, eĉ en Rumanio.[35] Ankaŭ la tipe jugoslavia slogano de la „frateco kaj unueco“ (bratstvo i jedinstvo), plumpa imitaĵo de la devizo de la franca revolucio, fariĝis la plej grava mitopoezia ideologia moto de la titoisma regado. Per la akaparo de iamaj reĝaj palacoj, en kiuj Tito devis loĝi kaj rezidi (ĉar Belgrado estis grave difektita dum la milito),[36] komunismaj regadoformoj miksiĝis kun malnovstilaj potenc-simboloj de la reĝa epoko. Tito ege ŝatis la luksan vivstilon kaj lasis gardi sian personecon per ampleksa sekureca personaro. Ekstere Tito donis pri si la impreson de modesta homo kaj neis la ekzistadon de persona kulto, kiu devis resti tabua temo en la jugoslavia memprezentado.

Samtempe Tito ne hezitis fitrakti kamaradojn, kiuj kritikis lin aŭ kiuj kunlaboris kun la sovetianoj aŭ la Kominform-Buroo: Ili estis minacataj per eksigo el KPJ, per arestado en malliberejo aŭ izolado en koncentrejo. Famaj viktimoj de tiu persekutado fariĝis ekzemple Andrija Hebrang kaj Sreten Žujović, kiuj post la milito servis kiel ministroj en la registaro de Tito.[37] Poste ankaŭ Đilas, Ranković kaj aliaj estis forlasitaj kaj subpremitaj de Tito. Miloj da „devojiĝintaj“ jugoslavoj estis malliberigitaj en tiu tempo sur la adriatikaj insuloj Goli Otok kaj Sveti Grgur, kie por ili estis instalitaj specialaj labortendaroj, en kiuj regis teruraj vivkondiĉoj, kiuj estis komparebla kun la sovetia gulago aŭ kun nacisocialismaj lagroj. Tie la Tito-kontraŭuloj ricevis sian ´adekvatan´ punon, kiu estis speciale elpensita por ili, por ke ili povu reveni „purigitaj“ de siaj pekoj en la socion post kelkaj jaroj.[38] Fakte ĝis en la 50aj jaroj la jugoslavia sistemo portis klarajn trajtojn de stalinisma diktaturo.[39] Kio siatempe okazis en Jugoslavio kaj aliaj

[34] En printempo 1945 la katolika eklezio de Kroatio lamentis pri 243 murditaj pastroj.
[35] Ankaŭ en Bulgario Tito, kiu estis konsiderata kiel amiko de Georgi Dimitrov, estis populara.
[36] Poste Tito loĝis en relative modesta domo en la strato Rumunjska 15 en Belgrado.
[37] Hebrang, kroato de juda deveno, al kiu la titoistoj riproĉis, ke li laboris por la Gestapo, Ustaŝo kaj NKVD, malaperis en junio 1948 sen postlasi spurojn kaj verŝajne estis likvidita de la sekreta servo OZNA. Poste, la familio de Hebrang devis elteni reprezaliojn. Post la forigo de Ranković, Žujović estis rehabilitita kiel simpla partia membro kaj vivis ĝis 1976 en Belgrado.
[38] Pri Goli otok aperis lastatempe du novaj libroj de Josip Zoretić kaj Božidar Jezernik.
[39] Ankoraŭ en 1963, lige kun la persekutado de laŭdiraj kontraŭuloj de la rezolucio pri la Kominform-Buroo, en Jugoslavio estis arestitaj 30´313 personoj. (Halder, p. 304f.). En Jugoslavio, kiu posedis la reputacion de „aparte liberalisma komunisma reĝimo“, en ĉiuj periodoj estis efektivigitaj persekutoj, arestadoj kaj punoj pro politikaj kialoj, precipe kontraŭ kroatoj, serboj (en la 70aj jaroj) kaj albanoj (en la 80aj jaroj), Sendube, la politika reĝimo Jugoslavio estis malpli severa ol tiu en la najbaraj

´socialismaj´ landoj rilate al la persekutado kaj subpremado de homoj estis komparebla kun nazigermanaj kaj sovetkomunismaj praktikoj kaj estus nuntempe konsiderata kiel krimoj kontraŭ la homeco kaj homaro.

## Milovan Đilas, *La nova klaso* kaj la reago de Tito

Sufiĉe grandan internacian bruon kaj atenton kaŭzis, kiel menciite, la fama libro de Milovan Đilas, kiu furoris fine de la 50aj jaroj precipe en Okcidento pro la fundamenta kritiko kontraŭ la jugoslavia partia burokrataro, al kiu la aŭtoro riproĉis karierismon, ekstravagancon, korupton kaj ekspluatemon. *„La nova klaso"* provokis akran reagon de Tito, kun fatalaj sekvoj por la aŭtoro. La hereza analizo de Đilas pri la propra partio rapide montris la limojn de la tolerebla kritiko en Jugoslavio, kiu suferis, same kiel la aliaj komunismaj landoj, je la malsano de la limigo kaj subpremado de la opinia libereco en la publika politika sfero. La malpermeso de la verko de Đilas ĉesigis la komencitan liberaligon de la jugoslaviaj ŝtato kaj socio. Sed la influo de la kritikisto restis grandparte limigita al la intelektula opozicio. Tamen, la kritiko de Đilas pri la ekscesa misuzado de la potenco en Jugoslavio ne restis tute sen sekvoj. Sed la karismo de Tito mem (ankoraŭ) ne estis tuŝita, kaj la danĝero de politika krizo aŭ kontraŭkomunisma ribelo ene de la partio povis esti sukcese subpremata kaj evitata de la partiaj radikaluloj, kiuj eltenis nenian kritikon pri sia regadomonopolo. Certe, por Jugoslavio, kiu klopodis solvi la sekvojn de la milito kaj konstrui novan, pli bonan socion, ankoraŭ estis tro frue toleri kritiki laŭ la stilo de Đilas. Fakte nur jardekojn poste evidentiĝis, ke la kritiko de Đilas estis en principo prava. Kiam la 6an de majo 1962 Tito persone elpaŝis en Split antaŭ 100´000 ĉeestantoj, li publike kritikis la fenomenojn de la riĉiĝo, misuzado, salajraj diferencoj, partiaj privilegioj kaj klientismo.[40] Tiel, li iusence absorbis la ideojn de Đilas kaj mem starigis sin sur la pinton de la kritiko por montri al la popolo, ke li serioze konsideras la zorgojn de la malgrandaj civitanoj kaj persone okupiĝas pri la aktualaj problemoj en la ŝtato. Principe la samaj punktoj, kiujn jam Đilas traktis en sia *Nova Klaso*, estis diskutataj kaj esplorataj en la centra komitato de la partio mem. Kiujn sekvojn tiu nepublika debato havis, ne estas menciite de la aŭtoro, ĉar tio verŝajne ne estas konata. Kiel ĉiuj komunistoj de la sovetia tipo, ankaŭ Tito havis siajn problemojn kun la demokratio, ĉar lia socialismo eltenis nenian demokration. En 1969 Tito konkretigis la esencon de sia kompreno pri la demokratio jene: „En nia socialisma socio ekzistas [tia] demokratio, en kiu la homoj povas libere paroli kaj konscie efektivigi siajn iniciatojn. Sed estas klare, ke por tiuj, kiuj agas kontraŭ la socialismo, demokratio ne povas ekzisti, ĉar tio estus malĝusta". Klara vidpunkto! La reĝimo de Tito havis sufiĉe grandan arsenalon de paragrafoj je sia dispono por povi persekuti, puni kaj silentigi kritikistojn, kaj la koncernaj jugolaviaj leĝparagrafoj okulfrape similis al la praktiko dum la stalinisma tempo en Sovetunio (kie oni parolis pri spionado, sabotado, terorismo, ktp.). Eĉ la „malamika propagando" povis esti punita, per kio praktike ĉiuspeca kritika sinteno povis esti persekutata de la justico. Kvankam oni parolis pri demokratiaj balotoj, estis klare, ke Jugoslavio ne evoluas laŭ demokratiaj principoj, ĉar ankaŭ en Jugoslavio la nocio de la demokratio estis komplete perversigita kaj diskreditita.

## Politika subpremado kiel maniero ´solvi´ krizojn

En la jaroj 1966 ĝis 1971 Jugoslavio devis digesti plurajn gravajn krizojn, kiuj parte endanĝerigis eĉ la regadon de Tito. Al tiuj okazaĵoj Tito reagis laŭ sia instinkto eĉ sufiĉe lerte. Unue oni forigis la fifaman ĉefon de la jugoslavia sekreta servo, Aleksandar Ranković, kiu evidente fariĝis tro potenca. Fakte dank´ al li la liberaligo de la politika sistemo estis sukcese blokita kaj fiaskis. En junio 1968 en Belgrado eksplodis ribelo de studentoj, kiuj signalis, ke ili ne plu pretas subteni la politikon de Tito kaj postulis lian demision kiel ŝtatestro. La protestoj formiĝis kiel reago al la malfacila situacio sur la labormerkato, kiu apenaŭ promesis brilajn profesiajn perspektivojn al kvalifikitaj laborfortoj. Surprize, Tito, kiu bonvenigis la reformpolitikon de la „Praga printempo" kondamnis la agreson de la Varsovia Pakto kontraŭ Ĉeĥoslovakio kiel nepravigeblan enmiksiĝon, apogis tiun protestmovadon de la belgradaj studentoj kaj kulpigis la ŝtatan burokrataron pri la mizero en la labormerkato. Sed kiam en 1971 en Kroatio esprimiĝis naciisme motivitaj reform-strebadoj, Tito observis la eventojn kun skeptiko. Finfine li perdis la paciencon kaj decidis perforte disbati la „Kroatan printempon", kiu estis iniciatita de kroataj

---

landoj Albanio kaj Rumanio, kie la (neo-)stalinismo groteske furoris, dum Hungario kaj Bulgario travivis ioman liberaliĝon, precipe sur la kampo de la turismo, por venki sian teruran izolitecon.

[40] Vd. https://www.youtube.com/watch?v=OLXXJCjAryg.

intelektuloj, kulturagantoj, studentoj kaj laboristoj, kiuj postulis pli da rajtoj, pli da libereco kaj pli da memstareco por Kroatio. Sekve, dekmiloj da „frakciistoj", „teknokratoj" kaj „karieristoj", al kiuj oni riproĉis, ke ili provokis „ŝovinisman kaj naciisman kontraŭrevolucion", estis eksigitaj el la partio. Sub la nova kroatia partiestro Vladimir Bakarić la sufokita „Kroata printempo" estis prisilentata kaj tabuata en Jugoslavio. En Slovenio, Serbio kaj Bosnio-Hercegovino sekvis similaj kampanjoj kontraŭ la „liberismo". Kvankam lia maniero solvi tiujn krizojn ne estis sen duboj, Tito fariĝis pli forta kaj lia politiko trovis ankoraŭ pli grandan agnoskon de grandparto de la plebo. En tiu periodo ankaŭ la rolo de la armea potenco denove kreskis. Certe, per la akrigo de tia perforta politiko neniuj problemoj estis vere solvitaj, kaj ankaŭ la jugoslavia sistemo, kiu malgraŭ propraj reformklopodoj reprezentis ne pli ol version de la klasika stalinisma reĝimo, finfine montriĝis ne vere reformkapabla, same kiel ĉiuj aliaj stalinismaj kaj komunismaj reĝimoj en orienta Eŭropo, ĉar mankis la volo reformi ĝin. La reformado de la socialisma sistemo en nesocialisma senco vole-nevole signifus ĝian finon kaj la reenkondukon de la kapitalismo, kiun la jugoslaviaj komunistoj volis nepre eviti. Estas paradokse, sed malgraŭ la politika pliakriĝo dum da 1970aj jaroj la popolo memoras tiun jardekon iusence kiel „oran tempon" de Jugoslavio, antaŭ ol la ekonomia mizero de la 80aj jaroj komplete ruinigis ĝin.[41]

## Tito-kulto en la ekstera politiko

Dum enlande la politika potencialo de Tito ŝajnis esti foruzata kaj elĉerpita, ĝi ankoraŭ ekzistis sur la kampo de la ekstera politiko, kie aperis nova energio. En Jugoslavio formiĝis interesa evoluo en tio, ke post la rompo de la rilatoj kun la Sovetia Bloko Tito devis serĉi novajn partnerojn, kiujn li trovis antaŭ ĉio en la bloke ankoraŭ ne ´disdonitaj´ evolulandoj de la Tria Mondo. La interesoj de la jugoslavia diplomatio do direktis sin precipe al certaj landoj de Afriko kaj Azio, kiujn Tito, ĉefkomandanto de la armeo kaj de ŝtatprezidento (de 1953), vizitis regule kaj ofte. La simpation de Tito ĝuis landoj kiel Birmo, Sudano, Etiopio, Libio kaj Egiptio, kiun li vizitis 17-foje. Ke li renkontiĝis kun plej dubindaj ŝtatestroj kaj kelkaj tre ´malbelaj´ potenculoj kaj diktatoroj de la mondo, evidente ne ĝenis lin. En Rumanio li estis entute 12 fojojn, kvankam Ceaușescu estis foje titolita de li kiel „pugolekanto". Aliflanke, Bulgarion li vizitis nur dufoje, malgraŭ laŭdira amikeco kun Dimitrov. Makedonio formis obstaklon por la amikeco. Tiel, inter 1945 kaj 1972 Tito plenumis sume 170 ŝtatajn vizitojn, kiuj kondukis lin en 70 landojn, inter ili ankaŭ kelkaj okcidentaj. Post la morto de Stalin Tito rekomencis viziti Sovetunion. Inverse, la vizito de Ĥruŝĉov en Jugoslavio en somero 1955 bone taŭgis por la jugoslavia propagando. Aliflanke, la diplomatiaj rilatoj kun Federacia Respubliko Germanio estis interrompitaj, post kiam GDR estis agnoskita de Belgrado.[42] Novan dimension la jugoslavia ekstera politiko kaj la karismo de Tito ricevis, kiam en 1961 en Belgrado estis fondita, kun Nehru kaj Nasser, la movado de la Blokneŭtralaj Ŝtatoj, al kiu ĝis 1979 aliĝis 90 landoj. Sed al tiu movado, kiu estis idealigita de la membroj kiel pacverko inter la blokoj de la Malvarma Milito, dekomence mankis ĝia kapablo de la politika, ekonomia kaj armea integriĝoj. Male, tiu movado servis al la koncernataj membroŝtatoj antaŭ ĉio kiel propaganda instrumento. Ankaŭ ne estas sekreto, ke la plimulto de tiuj landoj, kiuj konsideris sin „neŭtralaj", staris ideologie sur la maldekstra flanko, simpatiis kun la marksismo/socialismo/komunismo kaj estis orientitaj kontraŭ Usono kaj la Okcidento. Jugoslavio do nur povis profiti de ĝi, ĉar la projekto sendube fortigis la prestiĝon de la Tito-ŝtato kaj de Tito en eksterlando.

Malgraŭ sia intensa internacia vojaĝa aktiveco Tito ankaŭ neniel neglektis la regionojn de Jugoslavio, kiujn li ofte vizitis. Dum tiuj okazoj lia karismo kaj la persona kulto ricevis novajn impulsojn. En Titovo Užice estis starigita grandega Tito-statuo kaj en Belgrado estis malfermita speciala Tito-muzeo, kiun la aŭtokrato ricevis kiel donacon okaze de sia 70a jariĝo. Kiel plia kulmino de la Tito-kulto, kiu adoptis pli kaj pli bizarajn trajtojn, en novembro 1974 lia naskiĝloko estis transformita kiel parto de muzea vilaĝo pri la historio de la partizanoj, kaj tiel Kumrovec ricevis kvazaŭ la neoficialan statuson de nacia pilgrimejo. Krom tio, la vivoverko de Tito estis fiksita kiel nacia valoro en la konstitucio de la „Socialisma Federacia Respubliko de Jugoslavio" (SFRJ).[43] En tiu serio de specialaj honoroj kaj omaĝoj ne mankis ankaŭ, ke Tito estis diskutita kiel kandidato por la nobelpremio por paco. Ŝajnas ke tiu ambicio estis unu numeron tro granda por tia ŝtatestro, en kies nomo aŭ laŭ kies ordono estis farataj ankaŭ diversaj gravaj lezoj kaj krimoj kontraŭ la homeco kaj homaro (sed ĉu tiu konsidero estis la ĉefa motivo por rifuzi al li

[41] Paralelon oni povas vidi kun la tempo de Breĵnev en Sovetunio, kiun la sovetia popolo konsideris „ora tempo".
[42] Nur en 1968 la diplomatiaj rilatoj de YU kun FRG estis restarigitaj.
[43] La titoisma Jugoslavio ricevis 5 konstituciojn, kiuj respegulis ĉiam pli kaj pli komplikan (aŭ kompleksan) ŝtatan konstruon.

la nobelpremion ne estas konate). Kiel Dedijer kaj Ivanij rimarkigis, Tito ne ĉiam sentis sin bone kun tia kulto.

## Hagiografia biografiko

Al la mitigo kaj idealigo de Tito kontribuis ankaŭ konvena biografiado kun hagiografia karaktero, kiu estis aŭtorizita de li mem. La ĉefa reprezentanto de tiu ĝenro estis Vladimir Dedijer, kiu estis jugoslavia komunisto, partizano, ĵurnalisto, politikisto kaj historiisto. Lia Tito-biografio aperis en 1953 en Ljubljana kaj estis tradukita en multajn lingvojn, ankaŭ al Esperanto.[44] La rakontoj, kiuj estis prezentitaj en tiu verko, sonis kiel fabeloj aŭ legendoj kaj estis legataj kaj kredataj de milionoj da jugoslavoj kaj eksterlandanoj. La duonoficiala Tito-biografiko de Dedijer malsanis je diversaj plibeligoj, troigoj kaj prisilentoj; post la morto de Tito ĝi estis parte reviziita kaj relativigita – de la sama aŭtoro Dedijer mem[45] kaj de Milovan Đilas, kiu verkis propran kritikan biografion pri Tito.

La abunda festado honore al la 85a datreveno de la naskiĝo de Tito en la jaro 1977 povas esti konsiderata kiel kulmino de la Tito-kulto, kiu post tio ial komencis malfortiĝi. En sia alta aĝo Tito estis pli kaj pli izolata de sia ĉirkaŭaĵo, kaj nur kelkaj altrangaj funkciuloj kiel Kardelj, Ljubičić kaj Dolanc formis la kernon de fideluloj, kiuj estis allasataj al Tito persone. De sia edzino Jovanko Budisavljević, kun kiu Tito estis geedze ligita pli ol 20 jaroj, li vivis separita. Speciala leĝo por protekti la bildon de Tito reguligis la korektan prezentadon de Tito kaj antaŭvidis severan punon, se ĝi estis misuzita kaj malrespektita. Tiel, la persono de Tito estis plivalorigata kaj kvazaŭ protektata de aŭtoraj rajtoj. Sed kiel rapide la sano de Tito malboniĝis, tiel rapide ankaŭ Jugoslavio falis en la ekonomian abismon, des pli ke la proleteca marŝalo ne vere interesiĝis pri demandoj kaj problemoj de la ekonomio (pri kiu li supozeble malmulte komprenis). Dum la 80aj jaroj la eksterlandaj ŝuldoj de Jugoslavio atingis danĝeran nivelon de pli ol 20 miliardoj da dolaroj (kio tiam estis giganta sumo) kaj akcelis la inflacion, kio finfine kondukis la nacian valuton al la kolapso, kun kun Jugoslavio mem.[46]

## Kulmino de la Tito-kulto okaze de specialaj festotagoj

Post tiu sinkrona analizo Halder esploris laŭ diakrona metodo elektitajn terenojn kaj sferojn, en kiuj la kulto ĉirkaŭ Tito estis aparte subtenata. En tio estas konsiderataj precipe la jugoslaviaj amaskomunikiloj, lernolibroj kaj la filmproduktado, kiuj staris en la servo de la propagandado de la Tito-kulto. Kiel montras diversaj leteroj, petoj kaj plendoj, kiujn Tito ricevis de sia popolo, la tutampleksa Tito-kulto havis efikojn ĝis en la privata vivo de la jugoslavoj. Ekzemple la sekreta servo UDBA detale informiĝis pri la verkintoj de tiuj leteroj por kontroli ilian sintenon rilate al la ŝtatestro. Kio koncernas la plendojn, la esplorita materialo havigis la scion, ke rektaj atakoj kontraŭ Tito estis esceptaj kaj ke la Tito-kulto estis kritikata nur tre malofte, dum en la plimulto de la leteroj la regado de Tito kaj ties karismo estis agnoskataj kaj konfirmataj. Kvankam la jugoslavoj estis alvokataj manifesti sian amsenton al Tito, kiu transprenis ankaŭ patronecojn por novnaskitaj infanoj, kiel patrofiguron kaj popolheroon, en la esploritaj leteraroj oni ne povis trovi ekzemplojn de erotikaj esprimoj.

Kiel montras la ĉapitro pri la unuamajaj festoj, la ŝtato ne timis altan financan ŝarĝon por teni la Tito-kulton vivanta. Ĉiujare oni elspezis pli da mono ol en la antaŭa jaro. Tiel, la unuamajaj festoj de la jaro 1957 voris entute 35 milionojn da dinaroj, sen la kostoj por la armea parado. Post 1965 la unuamajaj festoj estis transformitaj al popola festo sen armea karaktero, kaj la Tito-kulto estis iomete reduktita ĝis kiam en la plej lastaj vivojaroj de Tito ĝi estis ankoraŭfoje draste revivigita.

La karismon de Tito la popolo devis vere senti okaze de la 25a de majo, kiu estis enkondukita en Jugoslavion kiel festotago okaze de la ´nova´ naskiĝtago de Tito. En sporta maniero oni komencis per la organizado de stafeto tra la tuta lando por demonstri la ligitecon de la popolo kaj de la junularo kun la kamarado Tito kaj kun la Centra Komitato de KPJ. Ke en la dek unu jaroj inter 1945 kaj 1956 en tiuj stafetoj partoprenis pli ol dek milionoj da homoj, kiuj trakuris 860 mil kilometrojn, ilustras la enorman mobilizan energion, kiun tiu tradicio havis aŭ kaŭzis. Krom tio estis organizitaj ankaŭ specialaj „partizanaj marŝoj“ por krei ĉe aventuremaj junuloj konkretan etoson de la partizana romantiko kaj por

[44] La Esperanto-eldono aperis en 1954 ĉe Slovenia Esperanto-Ligo en Ljubljana.
[45] Precipe en *Novaj kontribuoj al la biografio de Josip Broz Tito*. Belgrado 1984. (Ekzistas nur en sbkr. lingvo).
[46] Interbhuon kun Tito en 1976 vd. sub https://www.youtube.com/watch?v=HxG5AbjJyIY.

fari, ke la kolektiva memoro pri la milito restu daŭre viva ĉe la postaj generacioj. La 25a de majo de la jaro 1957 estis transformita al la „tago de la junularo“. Estas klare, ke tiuj ritualigitaj festoj kun politika-kultura-sporta karaktero, en kiuj partoprenis ĝis 50% de la popolo, estis akompanataj de laŭtaj gazetaraj kampanjoj kun ideologia kaj eksterpolitika enhavo kun la celo emfazi la unikecon de la jugoslavia vojo al la socialismo aŭ komunismo kaj atesti la defendo-pretecon de Jugoslavio. Tiel, la Tito-kulto konstante ricevis novan nutraĵon. Ju pli maljuna Tito fariĝis, des pli intense kaj pompe la 25a de majo estis festata, ekde la 70aj jaroj ankaŭ kun la subteno de la kolora televido.[47]

Kiel atentemaj observantoj rimarkis, la intenseco de la amasmedia Tito-kulto riskis malfortiĝi jam en la dua duono de la 60aj jaroj, des pli ke la 25a de majo ne estis tre populara festotago en la kamparanaj regionoj pro la eksmoda ceremoniado de maljunaj partiaj kamaradoj. En la rondoj de la organizantoj de tiuj aranĝoj ekzistis ankaŭ voĉoj, kiuj pridubis la sencon de tiuj politikaj manifestacioj, sed ŝajnas ke ilia kritiko restis dume sen sekvoj aŭ efikoj.

Krom tiuj du festotagoj, ankoraŭ aliaj historiaj eventoj estis adekvate celebrataj kiel la memorado pri la 2a AVNOJ-kunsido (29.11.) kaj la 40a datreveno de la fondo de KPJ, kiu estis festata precipe kadre de speciala „jubilea jaro“ (kaj kiu kostis pli ol 62 milionoj da dinaroj (kiuj tiam egalvaloris al ĉirkaŭ 330´000 DM). La jaro 1961 donis la okazon por memori la 2an datrevenon de la „ribelo“ kontraŭ la okupantoj, kiu markis en la partizana mitologio la komencon de la jugoslavia „revolucio“. La festado, kiu estis ligita kun la konstruado de diversaj monumentoj, ekzemple la inaŭguro de la Tito-memorialo en (Titovo) Užice, kostis la malŝpareman ŝtaton pli ol 345 milionoj da dinaroj (t.e. ĉ. 1,28 milionoj DM). Samtempe, vastaj regionoj ekonomie degeneris kaj multaj homoj en Jugoslavio malriĉiĝis aŭ devis pergajni sian monon ekster la patrujo. Aliaj abunde festataj datrevenoj kaj jubileoj, kiuj celis la historiigon de la propra pasinteco, estis la 25a datreveno de la Sutjeska-batalo en 1968 (kun budĝeto de 50 milionoj da dinaroj), la 50a datreveno de la fondo de la partio en 1969, la ripeto de la datreveno de la Sutjeksa-batalo en 1973 (2,23 milionoj da dinaroj) por mencii nur kelkajn drastajn ekzemplojn de financaj ekscesoj kaj mondisipado. Ĉar dum tiuj jubileoj okazis ankaŭ gravaj organizaj paneoj, multaj partoprenantoj de la anoncitaj aranĝoj estis ĉagrenitaj, pro tio ke Tito ne ĉiam persone aperis en iu festakto, kvankam tio estis antaŭvidata kaj promesata.

## Tito-kulto post la morto de Tito

La 4an de majo 1980 Tito forpasis post longdaŭra malsano, do ne tute neatendite, en iu hospitalo en Ljubljana, Slovenio. La novaĵo pri la morto de la popola gvidanto, kiu estis konsiderata kiel senmorta, kaŭzis amasan psiĥozon ĉe la jugoslavoj. La funebra ceremonio por Tito fariĝis la plej granda amas-spektaklo de la tiama tempo kaj estis la plej lasta kolektiva emociiga evento de la popolamasoj en Jugoslavio post la morto de Stalin. La belgrada Tito-muzeo estis transformita al nova historia pilgrimejo por milionoj da homoj, kiuj volis viziti la plej lastan ripozlokon de Tito. La kulto estis komparebla kun la pilgrimadoj al la maŭzoleoj de Lenin aŭ Stalin en Sovetunio, de Maŭzedong en Ĉinio aŭ de Ho Ĉi Minh en Vjetnamio, des pli ke tiuj memorlokoj sukcesis allogi ankaŭ sennombrajn turistojn. Eĉ la konata Tito-kritikisto Dobrica Ćosić konfesis, ke li estis tute sola kun siaj „kontraŭ-titoismaj sentoj“ post kiam li preterpasis la ĉerkon de Tito post ses- aŭ sephora pacienca starado en la vico.

Post la morto de Tito la Tito-kulto estis daŭrigata sub la moto „Post Tito – Tito!“ Sed la jugoslavoj frustriĝis kiam ili devis konstati, ke la socialismaj aŭ komunismaj ideoj ne estis nur malkara iluzio, kiujn necesas prefere forgesi rapide, sed ke la vivo en Jugoslavio neniam plu estos la sama kiel antaŭe. La rest-karismo de Tito, kiu nun estis transfigurata en mort-kulton, estis utiligebla maksimume kiel nostalgia preteksto kaj por komercaj celoj, ĝis kiam ĝi estis anstataŭigita per novaj vivoformoj. Kiel nove enkondukita elemento de la Tito-kulto ekde 1981 en la tuta lando servis la „minuto de silento“ honore al Tito – tiucele en Jugoslavio la homoj kaj la tuta trafiko haltis en la 4a de majo je la 15a horo 05 minutoj. Integra parto de la mort-kulto fariĝis la deviga organizado de formalaj memor-ceremonioj en ĉiuj respublikaj de Jugoslavio, kiuj enhavis la deponadon de florkrono fare de la membroj de la ŝtata prezidio de SFRJ, de la armea gvidantaro kaj de reprezentantoj de la amasaj organizaĵoj. Ankaŭ infanoj, kiuj ne plu konis Titon, devis esprimi siajn sentojn en formo de speciale verkitaj poemoj kaj eseoj. La bilanco de la „Socialisma Unuiĝo de la laboranta popolo de Jugoslavio“ (SSRNJ) de aprilo 1982 montris trajtojn de

[47] Tamen ŝajnas, ke la jugoslavia amasmobilizado ne havis la saman devigan karakteron por la partoprenantoj kiel en la totalisma propaganda sistemo de Rumanio aŭ GDR, kie tiu popola mobilizado fariĝis deviga altrudo por la tuta socio, kun fatalaj konsekvencoj por civitanoj, kiuj rifuzis partopreni ĝin.

la adorado de sanktulo kadre de la postmorta Tito-kulto, se oni troige deklaris, ke „la memoron pri la kamarado Tito, unu el la plej brilaj personecoj ne nur de nia sed ankaŭ de la internacia laborista movado, de la movado de la Blokneŭtralaj Ŝtatoj, kies ide-inspiranto li estis, ni devas porti, protekti kaj flegi en niaj koroj. (…) La nomo kaj verko de Josip Broz Tito estas nerompeble ligita kun nia revolucio, kun la socialisma konstruado kaj kun la politiko de la blokneŭtraleco, kio estas devigo por ni.“ En 1982 en Moskvo estis inaŭgurita aparta placo je la nomo de Tito. Fakte, en la post-titoisma Jugoslavio la bildo de Tito restis ĉie konservata kaj videbla, kaj la bezono je Tito-devotaĵoj estis giganta. Pro la oftega vizitado de la Tito-memorialo en Belgrado ĝi devis esti pligrandigita. Migranta ekspozicio devis teni la memoron pri Tito viva, la popolarmeo lasis produkti kvalite altnivelajn bildlibrojn pri Tito, kaj la 1an de majo 1985 estis eldonita nova bankbileto je la valoro de 5000 dinaroj kaj kun la portreto de Tito (kadre de la galopanta inflacio tiu bileto rapide perdis sian valoron kaj fine de 1991 estis forprenita el la cirkulado). Rigarde al la akriĝanta ekonomia krizo en Jugoslavio leviĝis la demando pri la daŭra aktualeco de la politiko de Tito kaj pri la respondeco por la problemoj, kiujn lia absolutisma, monarki-simila regado postlasis.[48]

## Revizio de la Tito-historio kaj fino de la titoismo

Se ankoraŭ dum la 50aj jaroj Vladimir Dedijer (1914-90) firmigis per sia hagiografia Tito-biografiado la mitigon de Tito, la sama aŭtoro akcelis per siaj *Novaj kontribuaĵoj pri la biografio de Josip Broz Tito*[49] la erozion de la titoisma mito. En tiu plurvoluma verkego, kiu aperis en la jaroj 1980-84, la aŭtoro menciis interesajn faktojn kaj reviziis la historion de la titoismo, tiel ke la historiistoj sentis sin devigataj repritaksi la verkon de Tito, kies vivo devis esti reskribata. La komunisma partio reagis kun ĉagreno post la apero de tiuj libroj kaj decidis sankciojn kontraŭ verkistoj, kiuj aŭdacas kritiki la verkon de Tito. Nu, Dedijer, kiu vivis en Usono, ne devis timi reprezaliojn; almenaŭ li lanĉis utilan histori-reviziisman debaton precipe en Serbio, kie la diskutantoj ne nur komencis okupiĝi pri la persekutado de kominformistoj kaj pri la situacio sur la prizona insulo Goli Otok; per tio gravaj partoj de la verko de Tito estis pridubataj kaj do esencaj tabuoj tuŝataj.[50] Tiel, en la 80aj jaroj la Tito-kulto, kiu restis integra parto de la ŝtata sistemo kaj estis ligita kun la kanonizado de Tito, kunekzistis kun dinamika erozia proceso, kiu neeviteble kondukis al la rezigno pri la titoismo. Por eviti, ke la reputacio kaj la digno de la forpasinta ŝtatestro ne estu makulata, en septembro 1984 la nomo kaj bildo de Tito estis leĝe protektitaj fare de la federacia parlamento; ĉi-rilataj misuzoj estis punitaj per altaj monsumoj. Krom tio, la leĝo postulis, ke la bildo de Tito devas pendi en publikaj ejoj. La kontraŭ-titoismon, kiu pli kaj pli transformiĝis al agresemaj naciismaj emocioj, la protektantoj de la titoismo dume ankoraŭ klopodis bremsi, ĵetante nedeziratajn kritikistojn, ekzemple la kroatojn Tuđman kaj Veselica, en la malliberejon aŭ eliminante la verkojn de „reviziismaj“ politologoj kiel tiuj de la serbo Koštunica el la trafiko. Sed ankaŭ en Bosnio pli kaj pli aŭdiĝis voĉoj, kiuj vidis parton de la kulpo por la mizera situacio en la lando ĉe la vivstilo (sic) de Tito. Sendube, ankaŭ la slovenoj kontribuis laŭ sia maniero al la fino de la titoismo. Sed la rolon de la ĉefa protagonisto de la kontraŭ-titoisma movado ludis ĝuste Serbio, kiu falis en la manojn de la naciisma demagogo Slobodan Milošević, kiu sukcesis stilizi sin kiel novan karisman gvidanton, kvazaŭ kiel anstataŭanton de Tito. Integra parto de lia populisma politiko estis la emfazado de la rolo de Serbio kiel historia viktimo, kiu laŭdire suferis malavantaĝojn, subpremadon kaj diskriminacion en la tempo de Tito. La ultranaciisma politiko de Milošević, kiu ankaŭ celis enkonduki „kontraŭ-burokratian revolucion“, ne nur kondukis en la sakstraton sed finfine ankaŭ en la terurajn (interetnajn) militojn kaj genocidojn de la 1990aj jaroj kaj lin mem poste ankaŭ antaŭ la tribunalon por esplori militkrimojn en Hago, kie la „dua Tito“ trovis kun sia statuso de „supozebla militkrimulo“ sian sengloran vivofinon en la ĉelo de la tribunala prizono. Sed la stigmatizado de Tito kiel „kroato“ kaj malamiko de la serboj k.s. tute ne kondukis en Serbio al la malapero de lia karismo. Male, la „Ligo de unuiĝoj de batalantoj de la popolaj liberigaj militoj de Jugoslavio“ (SUBNOR) proponis aljuĝi al Tito la „Ordenon de la popola heroo“ por la kvara fojo. Sed la klopodoj teni la miton de Tito viva fiaskis, dum agresemaj

---

[48] Por ŝpari, la budĝeto de la armeo devis estis reduktita je la duono, iamaj rezidejoj de Tito estis transformitaj al hoteloj kaj la luksa ŝipo „Mevo“, kiu ne trovis taŭgan aĉetanton, estis vendita en aŭkcio. (Halder, p. 242f.)

[49] Bedaŭrinde, la verko estas disponebla nur en sbkr. lingvo (vd. Dedijer, V.: Novi prilozi za biografiju Josipa Broza Tita. Beograd 1980-4.)

[50] En la reviziita historio pri LKJ, kiu aperis en 1985, la nombro de arestitoj sur Goli Otok estis indikita per 16´312, sed la kontrolado de tiu ĉi cifero estas malfacila. (Halder, p. 247).

manifestantoj postulis en Belgrado la finon de la Tito-kulto kaj la gazeto *Politika* deklaris la miton de Tito principe morta. La tradicia „minuto de silento“ de la 4a de majo honore al Tito okazis por la plej lasta fojo en 1990. La honora gvardio ĉe la Tito-maŭzoleo, kiu ĝis nun estis vizitata de 14 milionoj da homoj, estis deprenita. La novaj politikaj elitoj ne plu estis interesataj pri la flegado de la Tito-mitologio, kaj per la disfalo de la „Ligo de komunistoj“ tiu ĉi movado perdis la plej gravan lobion. La bildo de Tito malaperis el publikaj ejoj kaj el la lernolibroj, kaj en 1991 la Tito-statuo en (Titovo) Užice estis faligita; la detruo de tiu monumento devis simboli la finon de la Tito-erao. La heredaĵo de Tito estis reinterpretita kiel simbolo por la eraroj kaj malfortoj de la dua jugoslavia ŝtato. Ĉiuspecaj konspiraj teorioj kiel tiu, ke la forpasinta Tito ne estis la vera Josip Broz, estis inventitaj kaj cirkuladis en la mondo. Malgraŭ tio, en 1991 reprezentantoj de federaciaj institucioj kiel JNA (armeo) deponis florkronojn sur la tombo de Tito. La postulo de la radikala serba partio de Vojislav Šešelj transloki la kadavron de Tito al Kumrovec estis akompanata de verva diskuto pri la fermo de la maŭzoleo en Belgrado. Post tiu decidita rifuzo de Tito Jugoslavio fordronis en la plej sanga popolmilito de post la dua mondmilito. Novaj vundoj krevis kaj Jugoslavio malfondiĝis kaj dispeciĝis laŭ siaj unuopaj konsisteroj. Nur en 2010 ĉe la tombo de Tito en Belgrado denove aperis oficiala delegacio, kiu estis sendita de la serba ministerio pri internaj aferoj.

## Nacia historizado en la postjugoslaviaj respublikoj

En la ĉapitro pri la post-titoisma historizado en la postjugoslaviaj respublikoj Halder montras la sekvojn kaj efikojn de la Tito-kulto. Kadre de la nova nacia orientiĝo en la sendependa Kroatio miloj da Tito-monumentoj kaj -memortabuloj estis forigitaj, multaj muzeoj, kiuj estis dediĉitaj al la dua mondmilito kaj al la laborista movado, estis fermitaj, kaj la historiistoj estis preparataj por la apoteozo de la kroata nacio. Aliflanke, en la postjugoslaviaj respublikoj la „jugonostalgio“ (aŭ Tito-manio) konservis ioman signifon en la turismo (Kumrovec, Brioni, Bled, Belgrado, Drvar, Jajce). Ŝajnas, ke la registaro en Zagrebo konsideras la figuron de Tito integra parto de la kroata kulturo aŭ historio kaj malaprobas atakojn kontraŭ lia memoro, kvankam la komunismo ne estis populara en Kroatio. En Bosnio-Hercegovino, kie la interetna milito kaŭzis plej multajn viktimojn, la Tito-nostalgio estas ligita antaŭ ĉio kun la paca kunvivado de la etnoj antaŭ la tempo de la sangaj interetnaj militoj de la 90aj jaroj kaj malpli kun la krimoj de la Tito-partizanoj dum la dua mondmilito aŭ kun la reprezalioj de la komunisma reĝimo. Kvankam la bildo de Tito malaperis ankaŭ el la publika spaco en Slovenio, ŝajnas ke en tiu iama jugoslavia respubliko la (sekretaj) simpatioj por li daŭre ekzistas, kiel iuj enketoj montris. Ĉar Makedonio dankas sian ekziston kiel teritoria unuo kaj memstara nacio kun propra lingvo al la verko de Tito, estas logike, ke la traktado de Tito kaj de la socialismo en tiu respubliko restis daŭre pozitiva. Ankaŭ en Montenegro, kie la ĉefurbo Titograd rericevis sian malnovan nomon Podgorica, ekzistas aktivaj jugo-nostalgiuloj. Kvankam parto de la Kosovo-albanoj konservis Titon en bona memoro, la kolektiva rifuzo de la titoismo kiel altrudita „serb-komunismo“ estas en tiu iama YU-provinco verŝajne plej forta. En Kosovo la partizanaj memorialoj estis anstataŭigitaj per UÇK-monumentoj. Ĉi tiuj ekzemploj montras, ke la ĝenerala akcepteco de Tito devis esti sufiĉe granda ĉe ĉiuj popoloj de Jugoslavio, malgraŭ politikaj kaj ekonomiaj krizoj kaj en komparo kun la gvidantoj de aliaj socialismaj landoj, kiujn ankaŭ la jugoslavoj konsideris pure stalinismaj diktatoroj. Kiel Halder fine konkludas, ŝajnas ke en la memorkulturo de la postjugoslaviaj respublikoj la pritakso de la historia rolo de Tito oscilas inter stigmatizado, malintereso-indiferenteco kaj nostalgia idealigo.[51] Kaj kiel Wolfgang Höpken atentigis, ĉiu respubliko faris siajn proprajn spertojn kun ´Jugoslavio´ kaj do perceptis la titoisman reĝimon laŭ diversaj manieroj, tiel ke oni povas diri, ke en Jugoslavio ekzistis diversaj spertoj kaj perceptoj de la socialismo aŭ eĉ diversaj socialismoj mem.[52]

Kion la Tito-kulto signifis por la jugoslavia kohero, Halder diskutas en la sekva ĉapitro, por veni al la konkludo, ke la establado de la jugoslavismo en la nacia aŭ etna senco fiaskis favore al la socialismo, precipe pro tio ke en la 60aj jaroj la komunistoj rezignis efektivigi la jugoslavismon perforte. Tiel, oni ne diris sen ironio, ke Tito, kiu ankaŭ parolis iun strangan „jugoslavian“ lingvaĵon inter la serbkroata kaj rusa, restis kvazaŭ la unua, sola kaj unika jugoslavo. Kiel ´supera patro´ de la jugoslavoj Tito funkciis ankaŭ kiel ĉefsimbolo de la komunaj jugoslaviaj valoroj; la iama kroatia partiestro Vladimir Bakarić

[51] Necesus fari novajn enketojn por sondi la aktualan staton de la sinteno de slovenoj, kroatoj, servoj ktp. rilate al Tito kaj Jugoslavio.

[52] Vd. la kontribuaĵon de Wolfgang Höpken „Durchherrschte Freiheit“ en: Grandits/Sundhaussen (eld.): Jugoslawien in den 1960er Jahren. Wiesbaden 2013.

(mort. en 1983) nomis ĉiun jugoslavon ne sen retorika troigo „disĉiplo“ aŭ „lernanto“ de Tito. Sed kiel oni povis vidi, la figuro de Tito post ties morto ne plu sufiĉis kiel gluo por kunteni la komunan ŝtaton. Malgraŭ la gvida rolo de la marksismo-leninismo (kvazaŭ kiel anstataŭa religio) kaj malgraŭ la slogano pri la „unueco kaj frateco“, en Jugoslavio mankis vera kaj daŭre valida integra ideologio. Kiel tia ideologio povintus aspekti kaj funkcii restas neklare, kaj la komparo kun Svislando kiel modelo por Jugoslavio, kiel oni faris ĝin de tempo al tempo, ŝajnas neadekvata, realecfremda, absurda. Ke Jugoslavio falis post la dua mondmilito en la sferon de la komunismo, evidente ne estis evitebla kaj probable estis historia eraro. Pri la integracia karaktero kaj koheriga efiko de la titoismo ne ekzistas unuanimeco en la faka literaturo. Dum unu parto de aŭtoroj opinias, ke ĝis la disfalo de Jugoslavio iu sento de jugoslavia komuneco ja ekzistis, aliaj asertas, ke la slogano de la „unueco kaj frateco“ estis nenature altrudita doktrino. Malgraŭ mankoj kaj deficitoj oni konfesas, ke la titoismo posedis sufiĉe grandan mobilizan efikon. Ĉar por la jugoslavia periodo ne ekzistas ĉi-koncernaj enketoj aŭ sociologiaj studoj, la kvalito de la amplekso, en kiu la pereinta ŝtato ĝuis legitimecon, estas altgrade spekulativa kaj metodike malfacile taksebla. Kiel Halder akcentas, krom la Tito-kulto kiel instrumento por efektivigi la sinergian karismon de Tito, ankaŭ la partio, la armeo, la amasaj organizaĵoj kaj la memadministra(ta) sistemo grave servis al la sociigo de la homoj en Jugoslavio. Malgraŭ ĉio, la centrifugaj fortoj, kiuj ĉiam karakterizis la strukturojn de Jugoslavio kaj kiuj povis esti subpremataj dum la komunisma periodo, ne estu subtaksataj. Post la fino de la komunismo tiuj fortoj plene eksplodis en Jugoslavio kaj definitive detruis la komunan ŝtatan kreaĵon.

## Ambivalenta konkludo

Krom la utiligo de la ampleksa fakliteraturo en diversaj lingvoj, kiu aperis antaŭ kaj post la disfalo de Jugoslavio pri la temo ´Tito´, la aŭtoro povis konsulti nemalhaveblajn arkivaĵojn en Belgrado kaj Zagrebo. Dum la aktoj de la serbaj arkivoj estas fermitaj por la daŭro de 30 jaroj, en Kroatio la esploristo povis atingi partan nuligon de tiu ferma limigo. Kiel plia esplor-materialo servis la gazetoj *Borba* kaj *Politika*.

La libro de Marc Halder prezentas brilan analizon, kiu estas karakterizata de nekutima objektiveco, kiu radikale diferenciĝas de la tradicia ideologia unuflankeco de la Jugo-historiografio kaj Tito-biografiko, evitante embarasan naivecon kaj ridindan patoson. Malgraŭ tio, ke Tito povas esti konsiderata kiel dubinda politikisto kaj iriza personeco, aperas la impreso, ke la aŭtoro principe ne postlasas negativan bildon pri Tito, tiel ke la demando, ĉu Tito estis bona aŭ malbona, finfine estas malfacile respondebla kaj restas malferma. Pli ol 30 jaroj post la morto de Tito daŭre ekzistas en la traktado de tiu karisma figuro la tento idealigi ĝin. Tio estas danĝera. Eĉ kun ia simpatio, kiun oni povus havi por la titoisma Jugoslavio, oni ne forgesu, ke ankaŭ en la kazo de tiu ŝtato temis pri sufiĉe terura komunisma diktaturo kun dubinda jura kaj subprema sistemo kaj kun aŭtokratisma potenculo kiel ŝtatestro. La plej malgranda klopodo aŭ provo idealigi tian sistemon kaj beligi aŭ bagateligi ĝiajn mankojn, devas fiaski jam en la kerno, ĉar tio estus simple neakceptebla. Oni do povas nur averti kontraŭ la romantikigo de la situacio en la titoisma Jugoslavio, kontraŭ la naiva revado kaj entuziasma laŭdado de la komunismo kaj kontraŭ la forgesado de la krimoj, kiuj estis farataj en ĝia nomo. Malgraŭ ia kulturo de la (pseŭdo-)pacifismaj sloganoj, kiu estis parto de la politiko de la ´socialismaj´ landoj, almenaŭ el la vidpunkto de la kriminala juro Tito malmulte kontribuis al la humanigo de la jugoslavia socio. Kiel montras pluraj ekzemploj, li male sukcesis subpremi ĉiujn liberecajn (aŭ demokratiajn) tendencojn, kiuj aperis en lia regno kaj kiuj ne kongruis kun la koncepto de la titoismo kaj la personaj ideoj de Tito. Ankaŭ en Jugoslavio, en la laŭdire pli bona socialisma ŝtato, la homaj rajtoj estis lezataj grandstile, sisteme kaj laŭ diversaj manieroj. Hodiaŭ, Josip Broz Tito estus plej verŝajne konsiderata kiel militkrimulo. Preskaŭ neniu kritikis tion dum la vivotempo de Tito, neniu okupiĝis prie. La plimulto de la jugoslaviaj civitanoj kondutis kiel konsentaj cinikaj jesuloj, indiferentaj timemaj silentuloj aŭ oportunismaj, hipokritemaj kaj mensogemaj lojaluloj, kiujn la totalisma komunisma sistemo neeviteble produktis kaj bezonis. La pli malpli aktivaj partoprenantoj fatalisme adaptis sin kaj aranĝis sin kun tiu sistemo, ĉar alternativo ne ekzistis (krom la elmigrado[53]). Nemalmultaj homoj ankaŭ persone profitis de tiu sistemo laŭ dubindaj manieroj, pro kio la sorto de la aliaj homoj ne interesis ilin. La ekzemploj de

[53] El nuntempa eŭropa vidpunkto tiu formo de elmigrado estis nehumana, ĉar la sudlandaj gastlaboristoj restis longtempe separitaj de siaj familioj.

Hebrang, Đjilas, Ranković, Vukmanović kaj aliaj montras, kia tragika sorto trafis homojn en Jugoslavio, kiuj aŭdacis kritiki la totalisman sistemon aŭ la personon de Tito, eĉ se ili mem estis ĉefaj reprezentantoj al la sistemo kaj kunrespondeculoj por diversaj krizoj kaj krimoj. Ili estis eliminitaj, persekutitaj, enprizonigitaj, silentigitaj kaj prisilentitaj. Ankaŭ multaj okcidentaj akademiuloj, intelektuloj kaj politikistoj parte estis allogitaj de la ĉarmo de Tito kaj hezitis kritiki la jugoslavian reĝimon aŭ sistemon, kiun oni admiradis kaj laŭdadis pro ĝia kontraŭstaro al Moskvo, kio eble estis ĝia plej granda historia merito, malgraŭ la iluzioj pri la socialismo en Jugoslavio. Multaj okcidentaj maldekstruloj tenis siajn okulojn kaj orelojn fermataj. Ĝuste ĉar multaj problemoj restis nesolvitaj en Jugoslavio, Tito estas kunrespondeca kaj kunkulpa pri la senĉesaj krizoj en la lando, pri la gravaj konfliktoj, kiuj eksplodis post lia morto kaj kiuj kaŭzis sennombrajn viktimojn, kiuj formas grandan parton de la hipoteko, kiun la postjugoslaviaj ŝtatoj heredis.

Entute, la libro de Halder do reprezentas modele verkitan sociologian studon kaj bonvenan politologian kontribuaĵon por pli bone kompreni la funkciadon de la titoisma Jugoslavio kaj la ekzamenojn, kiujn la komunisma regado en tiu sudorienteŭropa lando devis trapasi kaj majstri. La elektitaj ekzemploj el la historio de la Tito-kulto, kiujn la aŭtoro aldonis kaj komentis, faras lian libron aparte interesa kaj grava.

© Originale verkita en Esperanto de Andreas Künzli, Svislando, publikigita en julio 2015 sur www.planlingvoj.ch. La aŭtoro de ĉi tiuj recenzoj studis slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la zurika universitato (1983-91) kaj regule vizitis Jugoslavion kaj aliajn orienteŭrupajn landojn en la 1980aj jaroj kaj poste.




































Inflacio en Jugoslavio